V-18679/16
(1928)

OFICIALA JARLIBRO



DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1928

16ª JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

VENU AL

ANTVERPENO

LA

BELGA MONDHAVENO

KAJ ART-URBO

Riĉaj Muzeoj de Belartoj kaj antikvaĵoj, la unika Muzeo "Plantin-Moretus", mirindaj preĝejoj kaj belegaj konstruaĵoj, monumentoj kaj statuoj

★

Antverpeno 1930

Universala Ekspozicio pri Kolonioj, Mar-aferoj kaj Flandra Arto.

★

Urbo de la XXa Universala Kongreso de Esperanto 3—11 Aŭgusto 1928

★

NEKOMPAREBLA ALLOGAĴO POR LA TURISTO

OFICIALA JARLIBRO

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1928

16ª JARO

(Unua Jarlibro 1908. Ne aperis 1915, 1917—1919)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

Ĉiuj rajtoj rezervitaj



V-18619

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de UEA.

ENHAVO.

Antaŭparolo 8

Unua parto: Ĝeneralaĵoj.

Eklipsoj 16
Historio de la Civilizacio 20
Kalendaro 12
Kronologio 15
Lunfazoj 16
Religioj 44

Dua parto: Esperantismo.

Adresoj de Lingva-Komitatanoj 122
Blinduloj: internacia asocio 125
ĉeĥoslovaka societo 153
finna societo 161
germana societo 167
hungara societo 172
Datoj el historio de Esperanto 17
Esperanto-Kongresoj 39
Pioniroj de la Esperantismo 41
Kiel fariĝis nia movado 72
Gazetoj internaciaj 135
Bulteno de Scienca Asocio 138
Esperanta Ligilo (blindula) 135
Esperanto 135
Esperanto-Junularo 136
Esperanto-Praktiko 136
Espero Katolika 137
Espero Teozofia 138
Fervojisto 136
Fluganta Skribilo 138
Heroldo de Esperanto 135
Informanta Bulteno de P. T. T. 137
Interligilo de P. T. T. 137
Internacia Medicina Revuo 136
Internacia Pedagogia Revuo 137
Internacia stenografisto 138
Juna Batalanto 137
Katolika Mondo 137
Kristana Revuo 137
Lernanto 136

Ligilo por vidantoj 136
Nova Tago 138
Oomoto 138
Oomoto Internacia 138
Ora Epoko 137
Pedagogia Servo 137
Sennacieca Revuo 136
Sennaciulo 136
Skolta Heroldo 138
Vegetarano 138
Verda Stelo 135
Vojo de Klerigo 137
Gazetoj naciaj: Amerika Esperantisto 202
Arbeider-Esperantisten 188
Arbeiter-Esperantist 165
Argentina Esperantisto 140
Arguso (meksika) 184
Aŭroro (ĉeha blindula) 151
Aŭstria Esperantisto 142
Belga Esperantisto 144
Brazila Esperantisto 146
British Esperantist 147
Bulgara Esperantisto 149
Bulteno de Antverpena Komitato 144
Ĉeĥoslovaka Preso 151
Esperanto en Nipponlando 174
Esperanto-uutiset 161
Forta voko 155
Germana Esperantisto. 165
Holanda Esperantisto 185
Hungara Heroldo 172
Informilo de SEU 194
Informoj de Estona Asocio 159
Intermembra Informilo 185
International Language 147
Itala Esperanta Revuo 177
Kataluna Esperantisto 170
Konkordo 197
Marto 135, 151
Movado 135
Norvega Esperantisto 188
Ondo de Daŭgava 182
Pacifika Espero 202

Paris-Esperanto 162
Pola Esperantisto 191
Progreso 151
Revuo Orienta 174
Sciigoj (germana) 165
Socialisto 142
Suda Kruco 141
Suno Hispana 170
Svenska Arbetar 198
Svenska Tidningen 198
Teritoria Tribuno 151
Utrechta Esperantisto 185
Verda Lumo 154
Verda Mondo 174
Verda Ombro 174
Verda Utopio 174
Institutoj internacia: belga 144
ĉeĥoslovaka 151
estona 159
finnlanda 160
germana 165
greka 168
hispana 170
hungara 172
itala katedro 177
japana 173
rumana 193
Instruistoj: internacia 130
finna 161
germana 167
Junularo: katolika 128
skolta 134
tutmonda 127
Kalendaro internacia 17
Katolikoj: unuiĝo internacia 128
angla ligo 147
aŭstria ligo 143
ĉeĥoslovaka ligo 153
ĉeĥoslovaka unuiĝo 153
franca ligo 164
germana ligo 167
itala unuiĝo 177
internacio (IKA) 128

junularo (MOKA) 128
nederlanda ligo 186
urugvaja societo 201
Laboristoj: aŭstria ligo 143
finna asocio 161
germana asocio 165
hungara societo 171
nederlanda federacio 186
pola societo 191
Organizo internacia: Akademio 122
Blindula Asocio 125
Centra Komitato 118
Fervojista Asocio (IAEF) 126
Landaj sekcioj: finna 161
itala 177
svisa 200
Junula Asocio 127
Instruista Asocio 130
Jurista societo 128
Konstanta Reprezentantaro 119
Kristana Ligo 128
Kuracista Asocio 129
Kvakera Societo 148
Lingva Komitato 121
Literatura Asocio 130
Muziknotada Asocio 130
Poŝtoficista Ligo 131
Polica Ligo 130
Radio Asocio 132
Scienca Asocio 133
Sennacieca Asocio 129
Skolta Ligo 134
Sporta Ligo 134
Stenografia Asocio 134
Teozofia Ligo 134
Universala Esperanto-Asocio 216
Vegetara Ligo kaj Unuiĝo 135
Organizo nacia: Argentina Asocio 139
Aŭstralazia Asocio 141
Aŭstria Delegitaro 142
Belga Ligo 144
Brazila Ligo 145
Brita Asocio 147

Bulgara Societo 149
Ĉehoslovaka Asocio 150
Dana Ligo 155
Danziga Asocio 156
Estona Asocio 158
Finnlanda Asocio 160
Franca Societo 162
Germana Asocio 164
Germana Ligo en Ĉehoslovakio 150
Helena Asocio 168
Hispana Asocio 169
Hungara Societo 171
Irlanda Asocio 175
Itala Federacio 177
Kataluna Federacio 170
Kuba Societo 181
Litova Asocio 182
Nederlanda Societo 185
Nord-Amerika Asocio 202
Norvega Ligo 187
Pola Asocio 191
Portugala Asocio 192
Riga Societo 181
Rumana Societo 193
Saarteritoria Ligo 195
Sveda Federacio 198
Svisa Societo 199
Sovetlanda Unuiĝo 194
Sudslava Ligo 197
Urugvaja Societo 201

Tria parto: **Universala Esperanto-Asocio.**

Adresaro 225
Centra Oficejo 220
Garantiantoj 217
Komisiono 216
Komitato 216
Laŭlanda listo de lokoj kie U E A estas reprezentata, vidu laŭlandan parton en 2ª parto "Esperantismo" 139
Membroj Dumvivaj 217
Membroj Honoraj 220
Teritoria Organizo 221

Reklamoj: 92—117; 207—214; 601—608.

ANTAŬPAROLO.

1908—1928.

Habent sua fata l'b lli!

La vojo al sukceso estas dornoplena. Almenaŭ por movado kiel la nia, esence ideala, kaj samtempe grandutila. Pasintjare ni memoris la tagon kiam Dro Zamenhof eldonis sian unuan libron, la faman "UNUA LIBRO", hodiaŭ malofta bibliofila objekto. La vorto "libro" estas vere trograndigo, se oni konsideras la amplekson kaj la aspekton. Modesta broŝuro de kelkdek paĝoj, primitiva kovraĵo kaj sama presado. Sed la bonfarantoj de l'homaro malofte naskiĝis en palacoj, kaj sub la mizera aspekto de l'unua libro sin kaŝis trezoro. De tiu ĉi libro elkreskis nia nun vasta literaturo, dank' al saĝa sinlimigo de la kreinto de Esperanto, kiu modeste sin konsideris iniciatoro. Li lasis la evoluon de la lingvo al la uzado, ne trudis personan opinion, sed firme restis je principoj rekonitaj kiel bonaj. Post la "UNUA LIBRO" ni honoru alian, la fundamentan ŝtonon de nia lingvo: 'Fundamento de Esperanto". Ĝi estas la protektilo de nia lingva unueco, la bazo sur kiu konstruiĝis ĉio, kio estas skribita en nia lingvo. Kiel por pluraj popolaj idiomoj modernaj, la traduko de la Biblio estis la komenco de l'fiksita literatura lingvo, tiel la Fundamento de Esperanto estas la komenco por ĉio verkita en Esperanto!

Kvardek jaroj en vivo de lingvo estas nenio. Pro tio la kritikoj pri malrapida lingva progreso ne estas justaj en certa rilato. Unue klopodi por ke ekzistu uzantaro de la lingvo, due riĉigi la lingvon tio estas tro malfacila tasko por la manpleno da pioniroj. Popola lingvo jam posedas la uzantaron, dume la reguligadon prizorgas la specialistoj. Konkludo: Por ke Esperanto povu penetri en la vivon praktikan, necesas organizita komuneco de ĝiaj uzantoj. Nur faktoj impresas la mondon, ne idealaj revoj de alte pensantaj homoj. Uzado, praktiko, utiligo devas kompletigi la lernadon. El tiu ĉi vidpunkto kreiĝis antaŭ 20 jaroj la Universala Asocio de la Esperantistoj, nia UEA!

Minacis nin skismo, vera disfalo! Hodiaŭ 20 jarojn post la naskiĝo de pompe anoncita "Linguo Internaciona di la Delegitaro" Esperanto restas la unika lingvo internacia kun uzanta popolo. Ĝi estas vivanta lingvo kaj ne objekto de senfinaj provoj, de personaj preferoj kaj de kvazaŭ politikaj konsideroj. Kio restis el la aliaj! ili malhelpis al la ideo mem. Tion kion oni kritikis en nia sinteno,

la deviga firmeco de la lingvo evidentiĝis kiel nepre necesa, alie la variaj gustoj dispecigus la bazon mem.

Apud la lingva fundamento, ni bezonis organizon, ne ian kun belaj regularoj sed tian kun aktiveco. Tio fariĝis UEA kiu havas alian celon ol propagandaj societoj. Same kiel nia lingvo, ankaŭ la komenco de UEA estis modesta, eĉ primitiva.

Aperis 1908 la unua Jarlibro de UEA 24 paĝoj, 10—16 cm tute simple eksteraĵo, sed klara celo, difinita vojo. El ĝi fariĝis post 20 jaroj la nuna Jarlibro je 600 paĝoj, fidela spegulo de l'progreso. Ambaŭ libroj, la UNUA LIBRO kaj la JARLIBRO havas do sian sorton! kaj certe bonan!

La Jarlibro de UEA havis du celojn:

Unue: Informi koncize pri la Asocio, ĝia stato kaj la evoluo de la praktikaj servoj

Due: Koncentrigi en simpla maniero la praktikantojn de la lingvo.

La evoluo konfirmis la opinion de la unua redaktinto Sron Hodler, ke por sukcesigi nian klopodadon, necesas ligi ĉion kun la praktika vivo. La lingvo internacia servu al ĉiuj. Pro tio la preskaŭ nerva klopodado de UEA en la unua tempo, puŝi Esperanton ĉien. Turismo, aviado, komerco, gazetaro, studentoj, virinoj, junuloj k. t. p., vasta labo kampo, tro vasta por atingi multon. Tiu-ĉi servaro ja nature esprimiĝis ankaŭ en la ĉefa eldonaĵo. Anstataŭ ŝvebi en verdstela firmamento esperantista, UEA serĉis konkretajn realajn aferojn. Ke ĝi ne bankrotis idee, pruvas la pravecon de l'fondintoj.

La estinta Jarlibro de UEA, fariĝis la oficiala jarlibro de la tuta movado. Aŭdiĝas nun opinioj pri transformo aŭ ŝanĝoj de l'enhavo. Iuj deziras nuran jarlibron kun ĉiuj oficialaĵoj, statutoj, k. t. p., aliaj opinias ke ĝi estu miksaĵo, t. e. ne tro da oficialaĵoj sed pli da informoj ĝeneralinteresaj. Ambaŭ opinioj estas pravigeblaj. Tamen ekzistas argumentoj por la dua opinio, tiom konvinkigaj, ke necesas ilin konigi.

1. La eldono de la jarlibro, kiu malnoviĝas rapide, dependas de kotizantaj personoj, regule ŝanĝantaj ĝis 30 %. Pro tio necesiĝas iom varia enhavo de l'libro kaj ne nura Adresaro, uzata de proporcie malalta nombro.

2. Laŭ propaganda vidpunkto la montro de nura Adresaro neniel impresas; kontraŭe libro kun variaj informoj servantaj al kiom eble plej granda nombro trovas atenton, eĉ admiron.

Decida en ĉio estas fine la financoj. Sed pro tio, ke la Jarlibro dependas de la nombro de niaj anoj la povo altiri kiom eble plej multe da homoj eĉ neesperantistoj trudas variecon. Ni opinias, ke ni plenumas la deziron de la plimulto se ni daŭrigas laŭ la nuna maniero, evoluigante la etan esperantistan Jarlibron al vere internacia "Vademecum".

Per la nuna eldono nia Jarlibro eniras novan periodon de evoluo. Nia lingvo servu por interrilati internacie kun fremdlingvanoj. Granda ebleco estas en la turismo. Vi ĉiuj jam havis okazon vidi aŭ eĉ partopreni la famajn karavanojn por viziti fremdan landon. Sarkasma verkisto nomis tion "ŝafaro" kondukata de ŝafkondukisto, la interpretisto. Kiom simpliga estus la uzo de nia lingvo! Elementa vero por esti akceptata tamen bezonas tempon! Estas nia intenco labori pli energie en tiu direkto, iom post iom, plibonigante ĉiujare, ne malatentante nian propran intereson. Plezure ni akceptas viajn opiniojn kaj kritikojn, kiujn ni zorge ekzamenos.

La 1928a Jarlibro do jam estas adaptiĝo al la turismo. Modesta estas la komenco. Multon ni povus fari se ne estus malhelpoj tiom personaj, kiom financaj. Tamen per via kunhelpo ni certe sukcesos.

Servi kaj utili al ĉiuj estas devizo de UEA. Ĝin esprimas ankaŭ la Jarlibro kaj iam ĉi ni diros de ĝi kiel de l'UNUA LIBRO: Ĉi-tiu libro havis sian sorton!

HANS JAKOB,
Direktoro de UEA.

Atentigo. Per voĉdono de 7. III. 28 la Komitato de UEA decidis de nun uzi en oficialaj dokumentoj de la Asocio la landnomojn en = u j o =. Tiu uzo estis tuj aplikata en la oficiala parto de la gazeto ESPERANTO kaj valoras por la jarlibro de 1929. La nuna jarlibro estis jam preta. Pro tio ŝanĝo en la enpaĝigita libro, pro teknikaj kaj financaj kaŭzoj ne plu ebla.

UNUA PARTO

ĜENERALAĴOJ

KALENDARO POR LA JARO 1928

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
Januaro	—	—	—	—	—	—	1
	2	3	4	5	6	7	8
	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29
	30	31	—	—	—	—	—
Februaro	—	—	1	2	3	4	5
	6	7	8	9	10	11	12
	13	14	15	16	17	18	19
	20	21	22	23	24	25	26
	27	28	29	—	—	—	—
Marto	—	—	—	1	2	3	4
	5	6	7	8	9	10	11
	12	13	14	15	16	17	18
	19	20	21	22	23	24	25
	26	27	28	29	30	31	—
Aprilo	—	—	—	—	—	—	1
Pasko: 8	2	3	4	5	6	7	8
	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29
	30	—	—	—	—	—	—
Majo	—	1	2	3	4	5	6
Ĉieliro: 17	7	8	9	10	11	12	13
	14	15	16	17	18	19	20
Pentekosto 27	21	22	23	24	25	26	27
	28	29	30	31	—	—	—
Junio	—	—	—	—	1	2	3
	4	5	6	7	8	9	10
	11	12	13	14	15	16	17
	18	19	20	21	22	23	24
	25	26	27	28	29	30	—

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
Julio	—	—	—	—	—	—	1
	2	3	4	5	6	7	8
	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29
	30	31	—	—	—	—	—
Aŭgusto	—	—	1	2	3	4	5
Maria	6	7	8	9	10	11	12
Ĉieliro: 15	13	14	15	16	17	18	19
	20	21	22	23	24	25	26
	27	28	29	30	31	—	—
Septembro	—	—	—	—	—	1	2
	3	4	5	6	7	8	9
	10	11	12	13	14	15	16
	17	18	19	20	21	22	23
	24	25	26	27	28	29	30
Oktobro	1	2	3	4	5	6	7
	8	9	10	11	12	13	14
	15	16	17	18	19	20	21
	22	23	24	25	26	27	28
	29	30	31	—	—	—	—
Novembro	—	—	—	1	2	3	4
Ĉiuj Sankt-	5	6	7	8	9	10	11
uloj: 1	12	13	14	15	16	17	18
	19	20	21	22	23	24	25
	26	27	28	29	30	—	—
Decembro	—	—	—	—	—	1	2
Krist-	3	4	5	6	7	8	9
nasko: 25	10	11	12	13	14	15	16
	17	18	19	20	21	22	23
	24	25	26	27	28	29	30
	31	—	—	—	—	—	—

KALENDARO POR LA JARO 1929

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
Januaro	—	1	2	3	4	5	6
	7	8	9	10	11	12	13
	14	15	16	17	18	19	20
	21	22	23	24	25	26	27
	28	29	30	31	—	—	—
Februaro	—	—	—	—	1	2	3
	4	5	6	7	8	9	10
	11	12	13	14	15	16	17
	18	19	20	21	22	23	24
	25	26	27	28	—	—	—
Marto	—	—	—	—	1	2	3
Pasko: 31	4	5	6	7	8	9	10
	11	12	13	14	15	16	17
	18	19	20	21	22	23	24
	25	26	27	28	29	30	31
Aprilo	1	2	3	4	5	6	7
	8	9	10	11	12	13	14
	15	16	17	18	19	20	21
	22	23	24	25	26	27	28
	29	30	—	—	—	—	—
Majo	—	—	1	2	3	4	5
Ĉieliro: 9	6	7	8	9	10	11	12
	13	14	15	16	17	18	19
Pente-	20	21	22	23	24	25	26
kosto: 19	27	28	29	30	31	—	—
Junio	—	—	—	—	—	1	2
	3	4	5	6	7	8	9
	10	11	12	13	14	15	16
	17	18	19	20	21	22	23
	24	25	26	27	28	29	30

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
Julio	1	2	3	4	5	6	7
	8	9	10	11	12	13	14
	15	16	17	18	19	20	21
	22	23	24	25	26	27	28
	29	30	31	—	—	—	—
Aŭgusto	—	—	—	1	2	3	4
	5	6	7	8	9	10	11
	12	13	14	15	16	17	18
	19	20	21	22	23	24	25
	26	27	28	29	30	31	—
Septembro	—	—	—	—	—	—	1
	2	3	4	5	6	7	8
	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29
	30	—	—	—	—	—	—
Oktobro	—	1	2	3	4	5	6
	7	8	9	10	11	12	13
	14	15	16	17	18	19	20
	21	22	23	24	25	26	27
	28	29	30	31	—	—	—
Novembro	—	—	—	—	1	2	3
Ĉiuj Sankt-	4	5	6	7	8	9	10
uloj: 1	11	12	13	14	15	16	17
	18	19	20	21	22	23	24
	25	26	27	28	29	30	—
Decembro	—	—	—	—	—	—	1
Krist-	2	3	4	5	6	7	8
nasko: 25	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29
	30	31	—	—	—	—	—

Konstanta Kalendaro

(de 700ª ĝis 2099ª jaro)

Por trovi semajn-tagon respondan al iu ajn dato agu jene:

1. Trovu en A-tabelo ciferon ĉe la kruciĝo de linio de Jarcento kun linio de Jaroj (ekz. 0 por 1887).
2. Portu tiun ciferon en ĉefkolonon B, kaj trovu ciferon ĉe la kruciĝo kun linio de Monatoj (ekz. 6 por julio).
3. Ree portu novan ciferon eu ĉefkolonon C, kaj vidu serĉatan tagon ĉe la kruciĝo kun linio de tagnombroj (ekz. ĵaŭdo por 21ª; do 21ª de julio 1887 estis ĵaŭdo).

JARCENTOJ

A

7..	14..					17..
8..	15..	Ĝis 4 okt. 1582				
9..						18..
10..						
11..		Post 15 okt. 1582			15..	19..
12..					16..	10..
13..						

B

maj	aŭg	feb	jun	sep	apr	jan
		mar		dec	jul	okt
		nov				
	*feb	(*superjara)			*jan	

1	2	3	4	5	6	0	1
2	3	4	5	6	0	1	2
3	4	5	6	0	1	2	3
4	5	6	0	1	2	3	4
5	6	0	1	2	3	4	5
6	0	1	2	3	4	5	6
0	1	2	3	4	5	6	0

C

1	D	L	m	M	J	V	S
2	L	m	M	J	V	S	D
3	m	M	J	V	S	D	L
4	M	J	V	S	D	L	m
5	J	V	S	D	L	m	M
6	V	S	D	L	m	M	J
0	S	D	L	m	M	J	V

JAROJ

00	01	02	03		04	05
06	07		08	09	10	11
	12	13	14	15		16
17	18	19		20	21	22
23		24	25	26	27	
28	29	30	31		32	33
34	35		36	37	38	39
	40	41	42	43		44
45	46	47		48	49	50
51		52	53	54	55	
56	57	58	59		60	61
62	63		64	65	66	67
	68	69	70	71		72
73	74	75		76	77	78
79		80	81	82	83	
84	85	86	87		88	89
90	91		92	93	94	95
	96	97	98	99		

Kronologio.

La jaro **1928** de la *Gregoria Kalendaro* respondas al la jaro:

1928 de la *Julia Kalendaro* (komenco: 14 januaro 1928).

5688—5689 de la *Hebrea Kalendaro* (komenco de la jaro 5688: 15 septembro 1928 kaj 5689: 15 septembro 1928).

1346—1347 de la *Mahometana Kalendaro* (komenco de la jaro 1346: 1 julio 1927 kaj 1347: 20 junio 1928.

2704 de la *Hellenaj Olimpiadoj*.

136 de la *Franca Respublikana Kalendaro* (komenco de la jaro: 9 septembro 1927).

La *Gregoria Kalendaro* estas la Julia Kalendaro plibonigita per dekreto de Papo Gregorio XIIIª la 15 oktobro 1582 kaj sinsekve akceptita de la pli multaj civilizitaj ŝtatoj. (De 1918 la Unio de la Sovjetaj Respublikoj ankaŭ uzas la Gregorian Kalendaron.)

La *Julia Kalendaro* estas ankoraŭ uzata de la Ortodoksaj popoloj; ĝi diferencas de la Gregoria per tio, ke ĝi malfruas je 13 tagoj.

La *Hebrea Kalendaro* enhavas 12 aŭ 13 monatojn, la monatoj, fiksitaj laŭ la irado de la luno, 29 aŭ 30 tagojn; la 12-monataj jaroj havas 353, 354 aŭ 355 tagojn, la 13-monataj 383, 384 aŭ 385 tagojn. Tiuj diversaj jaroj sin sekvas tiel, ke je ĉiu 19ª jaro la komenco de la Hebrea jaro konicidu kun tiu de la suna jaro.

La *Mahometana Kalendaro* komenciĝas je la Heĝiro (16 julio 622 p. Kr.), t. e. la forkuro de Mahometo el Meko al Medino. La monatoj havas 29 aŭ 30 tagojn, laŭ la luno; la jaro havas ĉiam 12 monatojn kun 354 aŭ 355 tagojn.

Sezonoj komencas:

Printempo: 20 marto, 20 h. 44 m. *Aŭtuno*: 23 septembro 7 h. 6 m.
Somero: 22 junio, 16 h. 7 m. *Vintro*: 22 decembro 2 h. 4 m.
En la suda duonsfero la sezonoj estas inversaj.

NB. Depost 1925 la astronomoj de la tuta mondo akordiĝis por akcepti la Universalan Tempon, kiu estas la Civila Tempo de Greenwich. En tiu ĉi kalendaro estas uzata nur la Universala Tempo.

Lunfazoj.

🌑 NL = Nova luno. 🌕 PL = Plena luno.
🌓 UK = Unua kvarono. 🌗 LK = Lasta kvarono.

	1928				1929			
	NL	UK	PL	LK	NL	UK	PL	LK
Januaro	22	29	7	14	10	18	25	3
Februaro	21	28	5	13	9	16	23	1
Marto	21	28	6	14	10	18	25	3
Aprilo	20	26	5	13	9	16	24	1
Majo	19	26	4	12	8	15	23	1,31
Junio	17	24	3	11	7	15	22	29
Julio	17	24	3	10	6	14	21	29
Aŭgusto	15	23	1,31	8	5	13	20	27
Septembro	14	22	29	6	3	11	18	26
Oktobro	13	21	28	6	2	10	18	25
Novembro	12	20	27	4	1	9	16	24
Decembro	12	20	26	4	1	8	16	24

Eklipsoj en 1928.

Suna tuta, 19 majo, 13 h. 24 m. (maksim.), komenco 11 h. 25 m., fino 15 h. 23 m. Videbla en S. Afriko, Madagaskaro, suda parto de S. Ameriko.

Suna parta, 17 jun. 20 h. 27 m. (maksim.), komenco 20 h. 1 m., fino 20 h. 53 m. Videbla en N. Azio, N. Or. Eŭropo.

Suna parta, 12 nov. 9 h. 48 m. (maksim.), komenco 7 h. 33 m., fino 12 h. 3 m. Videbla en Eŭropo (ne Pirenea duoninsulo), Egipto, Tripolio, Eritreo, Somalio, Okc. Azio (ne Hindo-Ĉinio, marborda Ĉinio, Japanio).

Luna tuta, 3 jun. 12 h. 9 m. (mezo), komenco 9 h. 5 m., fino 15 h. 14 m. 27 nov. 9 h. 1 m. (mezo), komenco 6 h. 25 m., fino 11 h. 37 m.

Ĉefaj Lunkovroj: 28 jan. 20 h. 11 m. Ni Piscium, 11 feb. 23 h. 45 m. Kappa Virginis, 24 apr. 22 h. 5 m. Epsilon Geminorum, 25 apr. 21 h. 38 m. Kappa Geminorum, 27 majo 19 h. 15 m. Ni Virginis, 8 jul. 23 h. 48 m. 30 Piscium, 10 aŭg. 0 h. 55 m. Omega Tauri, 24 okt. 23 h. 16 m. Tau Aquarii, 22 nov. 17 h. 43 m. 30 Piscium, 2 dec. 22 h. 44 m. Eta Leonis.

1928-I

Januaro

1 D Novjaro. Brazila kaj Portugala Nacia Festo.
2 L
3 M Japana Novjaro.
4 Mk Esp. grupo 'Lumo'' fondita en Tirnovo, Bulgario, 1902.
5 Ĵ Japana Novjara Bankedo.
6 V Epifanio: Festo de Tri Magoj. Internacia Infanfesto. Rusa Vintrofesto.
7 S Plena Luno. Liberia Pionirtago.
8 D Koncepto de Mahomet. † W. STOLZE, fama stenografo, 1867.
9 L * R. H GEOGHEGAN, angla kaj usona pioniro, 1865.
10 M A. T. VON GRIMM skizas programon de lingvo internacia, 1860.
11 Mk Skota Fajrofesto.
12 Ĵ Hinda Novjaro. Unua Esp. grupo fondita en London 1903.
13 V † VICTOR COUSIN, 1867, kontribuinto al german-franca filozofia proksimiĝo.
14 S Lasta Kvarono. Unua Esp. kurso en Franclando, 1898.
15 D
16 L En Moskvo 1919 Soveta Registaro kreas Esp. Domon.
17 M Monaka Princfesto. Sa Antonio.
18 Mk Starigo de ZAMENHOFA Monumento en Varsovio 1925.
19 Ĵ
20 V Mahometa Ĉieliro. Persa Reĝofesto.
21 S Soveta Funebro: morto de Lenin. Albana Nacia Festo.
22 D Nova Luno. Tutrusa Revolucia Funebro.
23 L Hispana Reĝofesto. Luksemburga Nacia Festo.
24 M Sa Timoteo.
25 Mk Unua jarkunveno de Pariza Esp. Grupo, 1902.
26 Ĵ Latva Nacia Festo. Sa Polikarpo.
27 V Sa Joano Orbuŝa.
28 S Kuba Nacia Festo. Sa Karlo Granda.
29 D Unua Kvarono.
30 L Bulgara Reĝofesto. * H. B. MUDIE, prezidinto de UEA kaj BEA, 1880.
31 M Portugala Martirtago.

1928-II

Februaro

1 Mk Fondo de Hispana Esp. Societo, 1903.
2 Ĵ Katolika Kandelfesto: Purigo de Maria.
3 V Sa Blaso. * H. F. HÖVELER, kromnomita E. Ĉefeĉ, 1859.
4 S H. HODLER kaj E. PRIVAT fondas junulan grupon en Genève 1903.
5 D Plena Luno. Nacia Festo de Meksiko kaj San Marino.
6 L Rumana Festo de Unuiĝo.
7 M Islama Festo. * DE BROSSES, mondlingvano, 1709.
8 Mk * F. MOSCHELES, meceno de Esp., en London 1833.
9 Ĵ * F. GABELSBERGER, fama stenografo, 1789.
10 V Sa Skolastiko. † J. SEVENHUYSEN, holanda pioniro, 1923.
11 S Japana Nacia Festo. † RENÉ DESCARTES, 1650.
12 D Ĉina Tago de Unuiĝo.
13 L Lasta Kvarono. Panama Konstitucia Tago.
14 M Sa Valenteno.
15 Mk Esp. klubo "Stelo" fondita en Plovdiv, Bulgario, 1901.
16 Ĵ Litova Festo de Sendependo. Sa Juliana.
17 V Siberia Registaro enkondukas Esp. en lernejojn, 1922.
18 S E. enkondukita en lernejoj de Ĝeneva Kantono, 1921.
19 D Karnavalo, ĝis 21a. Rusa "Maslenica".
20 L
21 M Nova Luno. Grasa Mardo, lasta Karnavaltago.
22 Mk Usona Nacia Festo de Washington. Cindra Merkredo.
23 Ĵ
24 V Nacia Festo de Brazilo, Estonio, Kubo.
25 S
26 D
27 L Nacia Festo Dominga.
28 M Unua Kvarono. Nacia Festo de Urugvajo kaj Afganistano.
29 Mk Superjara aldona tago.

1928-III

Marto

1 Ĵ Germana Funebro pri Militviktimoj.
2 V
3 S Internacia Foiro en Leipzig.
4 D
5 L Bulgara Festo de Libereco. Internacia Foiro en Lyon, ĝis 18a.
6 M Plena Luno.
7 Mk Ĉeĥoslovaka Festo de Masaryk. Irlanda Noktofesto.
8 Ĵ ROMAIN ROLLAND, favore skribas pri Esperanto, 1918.
9 V
10 S Liberia Tombotago.
11 D * ANTONI GRABOWSKI, rus-pola pioniro, poeto, akademiáno, 1857.
12 L Sa Gregoro.
13 M
14 Mk Lasta Kvarono. Hebrea eta Purim.
15 Ĵ Nacia Festo de Egipto, Gvatemalo, Salvadoro.
16 V Persa Reĝofesto.
17 S Irlanda Festo de Patrik.
18 D Unua Esp. disradiado el Genève, 1924.
19 L Islama Festo.
20 M Printempa Ekvinokto. Persa Novjaro. Japana ekvinokta Festo.
21 Mk Nova Luno. Sa Benedikto.
22 Ĵ
23 V Islama Festo Bajram, ĝis 25a.
24 S Sa Gabrielo. Inaŭguro de Peterburga Soc. "Espero" 1892.
25 D Anoncfesto. Rusa Festo de Printempo.
26 L Egipta Reĝofesto.
27 M † SIFO, ĉina pioniro, gazetfondinto en Kŭantong 1915.
28 Mk Unua Kvarono. * JAN KOMENSKY (Comenius), 1592.
29 Ĵ
30 V † H. HODLER, prezidinto de UEA, redaktinto de "Esperanto", 1920.
31 S Sveda Fajrofesto (nokta). * TH. CART en 1855.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

1928-IV

Aprilo

1 D Internacia Trompŝerca tago. Palma Festo. Siama Novjaro.
2 L Restarigo de societo "Espero" en Peterburgo 1912.
3 M Konferenco de ICK, KR, UEA en Locarno 1926.
4 Mk Internacia Biciklista Unio fondita en Paris 1900.
5 Ĵ Plena Luno. Hebrea Pasko. Internacia Boksa Unio fondita en Paris 1913.
6 V Sankta Vendredo de Kristanoj.
7 S Greka Nacia Festo. Metra Sistemo leĝefiksita en Paris 1795.
8 D Pasko. Belga Reĝofesto. Volapüka Asocio fondita en Paris 1886.
9 L H. SEBERT kaj CH. MÉRAY raportas pri Esperanto al Franca Akademio, 1901.
10 M
11 Mk † TH. ROUSSEAU, vicprezidinto de UEA, 1916.
12 Ĵ Islama Festo. Sa Julio.
13 V Lasta Kvarono. Esp. Filatelia Ekspozicio, Budapest 1918.
14 S † ZAMENHOF 1917, en Warszawa.
15 D Rusa Tombotago. Kongreso de Esp. Radio-amatoroj, Paris 1925.
16 L Internacia celpafa Unio fondita en Paris 1921.
17 M
18 Mk Konferenco pri Esp. en Lernejoj, Genève 1922.
19 Ĵ Nacia Festo de Urugvajo kaj Venezuelo.
20 V Nova Luno. Sa Sulpico.
21 S Konferenco de ICK, KR, UEA en Genève 1924.
22 D Radiotelefona Esp. Konferenco en Genève 1924.
23 L Sa Georgo. Slava Flofesto.
24 M
25 Mk Sa Marko. † VOLNEY, fama filologo kaj mondlingvano, 1820.
26 Ĵ Unua Kvarono. Sa Kleto.
27 V Virina Paca Kongreso en Hago 1915.
28 S 20-jara Jubileo de UEA, fondita en 1908.
29 D Japana Reĝofesto. * CH. NODIER, mondlingvano, 1780.
30 L

1928-V

Majo

1 M Internacia Laborista Festo. Haitia Terkultura Festo.
2 Mk
3 Ĵ Pola Nacia Soleno. Unua Ruslanda Esp. Kongreso, Peterburg 1910.
4 V Plena Luno. * LÉON BOLLACK, pacifisto kaj mondlingvano, Paris 1859.
5 S
6 D Esp. grupo fondita en Reims 1902.
7 L † DE BROSSES, fama filologo kaj mondlingvano, 1777.
8 M † J. L. BURNOUF, fama filologo kaj mondlingvano, 1844.
9 Mk Unua Mondkongreso de Internaciaj Asocioj, Bruxelles 1910.
10 Ĵ Rumana Nacia Soleno.
11 V Brita Esp. Kongreso en Eastbourne 1913.
12 S Lasta Kvarono.
13 D Franca Festo de Jeanne D'Arc. Brazila Liberfesto.
14 L Paragvaja Festo de Sendependo.
15 M Bulgara Reĝofesto.
16 Mk Slava Festo de Jan Nepomuk.
17 Ĵ Ĉieliro Nacia Festo Hispana kaj Norvega.
18 V Unua diplomata Pac-Konferenco, Hago 1889.
19 S Nova Luno. Tuta Suneklipso.
20 D Kuba Nacia Festo.
21 L
22 M Jarkunveno de BEA, London 1918.
23 Mk Naskiĝo de Abdul Baha. Sa Dezirio.
24 Ĵ Tutslava Soleno de Kirilo kaj Metodio.
25 V Argentina Nacia Festo. Sa Urbano.
26 S Unua Kvarono. Hebrea Pentekosto.
27 D Pentekosto. WOODROW WILSON skizas ideon de Ligo de Nacioj, 1916.
28 L
29 M † Abato F. X. SOLIS, kanada pioniro, en 1903.
30 Mk Islama Festo Kurban. Usona Tombotago. Fino de la Mondo antaŭdirita de M. EDGAR.
31 Ĵ * RENÉ DESCARTES 1596. † VOLTAIRE 1778.

1928-VI **Junio**

1 V Afgana Reĝofesto.
2 S Unua libro de Esperanto, cenzure permesita en Varsovio 1887.
3 D Plena Luno. Tuta Luneklipso. Triunua Festo. Brita kaj Itala Nacia Festo.
4 L † Dro Mybs, akademiano kaj prezidinto de Germana Esp. Asocio, 1923.
5 M Dana Nacia Festo.
6 Mk Sveda Nacia Festo.
7 Ĵ Katolika Dio-Festo.
8 V Esp. grupo fondita en Paris 1900.
9 S Sa Primo.
10 D Lasta Kvarono. † A. Ampère, fama fizikisto kaj mondlingvano, 1836.
11 L Sa Barnabo.
12 M
13 Mk
14 Ĵ Esp. grupo fondita en Grenoble 1902.
15 V Sa Vito.
16 S Sveda Reĝofesto. Unua itala Esp. Grupo fondita en 1903.
17 D Nova Luno. Parta Suneklipso. Islanda Fajrofesto.
18 L "Esperanto" fondita de P. Berthelot en 1905. † Pollen en 1923.
19 M Urugvaja Rikoltdanka Festo.
20 Mk Islama Novjaro. Sa Silvero.
21 Ĵ Somera Sunhalto.
22 V Latva Nacia Soleno.
23 S Tuteŭropa Popola Fajrofesto (nokta).
24 D Unua Kvarono. Sankta Johano-Festo.
25 L † Ivan Lojko, rusa pioniro kaj poeto, 1905.
26 M
27 Mk Unua Belga Kongreso, Verviers 1909.
28 Ĵ Serba "Vidov-Dan". Sudslava konstitucio.
29 V Islama Aŝur-Fasto. Saj Petro kaj Paŭlo.
30 S Nipala Reĝofesto. Bohema Unio Esp. fondita en 1907.

1928-VII **Julio**

1 D Jarmezo. * Leibniz 1646. Tutmonda Poŝta Unio fondita 1875.
2 L Norvega Reĝofesto.
3 M Plena Luno. † Antono Grabowski 1921.
4 Mk Nacia Festo de Usono kaj Urugvajo.
5 Ĵ Morava Festo de Kirilo kaj Metodio.
6 V Ĉeĥa Memorfesto de Jan Hus. Soveta Regno Soleno.
7 S
8 D Mongolia Regna Festo.
9 L Argentina Nacia Soleno.
10 M Lasta Kvarono.
11 Mk Sa Pio. Internacia Aera Komisiono fondita en Paris 1922.
12 Ĵ
13 V * J. Schleyer, aŭtoro de Volapük, en Oberlauda 1831.
14 S Franca Nacia Festo. Soleno de Brazilo, Argentino, Urugvajo.
15 D Esp. Societo fondita en Brno 1901.
16 L
17 M Nova Luno. Perua Esp. Societo malfermita en Lima 1903.
18 Mk
19 Ĵ Unua Usona Esp. Kongreso, Chautauqua 1908.
20 V Rusa Popolfesto de Tondro. Kolombia Nacia Festo.
21 S Belga Nacia Festo. Sa Praksedo.
22 D Sa Maria Magdalena.
23 L Sa Apolinaro.
24 M Unua Kvarono. Etiopia Reĝofesto.
25 Mk Hinda Fajrofesto. Sa Jakobo.
26 Ĵ Liberia Nacia Soleno. Sa Anna.
27 V Unua Esp. Nederlanda Kongreso, Hago 1913.
28 S Perua Nacia Festo. Unua Kongreso de UEA, Augsburg 1910.
29 D
30 L Sa Abdono. Dektria Esp. Kongreso, Praha 1921.
31 M Dekoka Esp. Kongreso, Edinburgh 1926.

1928-VIII

Aŭgusto

1 Mk Plena Luno. Svisa Federacia Soleno.
2 Ĵ Islanda Nacia Festo. (Semajno de la Esperanto-Kongreso.)
3 V Norvega Reĝofesto. † LOUIS COUTURAT 1914.
4 S Irlanda Nacia Festo. Sa Dominiko.
5 D Belga Kermeso. Unua Esp. Kongreso, Boulogne-sur-Mer 1905.
6 L Transfiguriĝo de Kristo. Rusa Somerfina Festo. Bolivia Nacia Festo.
7 M Unua Esp. Internacia Kunveno, Calais 1904.
8 Mk Lasta Kvarono. Sa Ciriako.
9 Ĵ Edziĝo de ZAMENHOF kun KLARA SILBERNIK, 1887.
10 V Ekvadora Nacia Festo. Sa Laurento.
11 S Germana Regna Soleno (Konstitucia tago).
12 D Sa Klara. † CARLO BOURLET, 1913.
13 L
14 M Sesa Esp. Kongreso, Washington 1910.
15 Mk Nova Luno. Asompcio.
16 Ĵ Egipta Nilfesto. † A. WACKRILL, brita pioniro.
17 V Kvara Esp. Kongreso, Dresden 1908.
18 S † † S. SCHULHOF 1919 kaj Dro PAUL NUYTS 1925.
19 D Rumana Herotago. Lasta Volapüka Kongreso, Paris 1889.
20 L Hungara Patronfesto de Sa Stefano. Sa Bernhardo.
21 M † A. CAUMONT 1925.
22 Mk Dekunua Esp. Kongreso, San Francisko 1915.
23 Ĵ Unua Kvarono. Dua Sudslava Kongreso, Split 1924.
24 V Sa Bartolomeo. Naŭa Esp. Kongreso, Bern 1913.
25 S Sa Ludoviko. Unua Volapüka Kongreso, Friedrichshafen 1884.
26 D * EMILE BOIRAC, prezidinto de Esp. Akademio, 1851.
27 L Dua UEA kongreso, Antwerpen 1911.
28 M Dua Esp. Kongreso, Genève 1906. † DALGARNO, mondlingvisto, 1687.
29 Mk Naskiĝo de Mahomet. Senkapigo de Sa Joano.
30 Ĵ † J. SILBERNIK, usona pioniro, bofrato de ZAMENHOF, 1925.
31 V Plena Luno. Nederlanda Reĝinfesto.

1928-IX

Septembro

1 S Unua Esp. gazeto en Nürnberg 1889. † E. ČEFEČ, 1918.
2 D
3 L San-Marina Patrontago. Usona Labortaga Soleno.
4 M
5 Mk Kvina Esp. Kongreso, Barcelona 1909.
6 Ĵ Lasta Kvarono. Ĝenevana Fasto.
7 V Brazila Nacia Festo. Sa Reĝino.
8 S † L. EINSTEIN, germana pioniro, eksvolapükisto, 1890.
9 D Pastro EICHHORN skizas Mondlingvon, 1861.
10 L * E. DUPLOYÉ, fama stenografo, 1833.
11 M Leipziga Infanfesto.
12 Mk Tutmonda Unio de Mezklasoj fond. en Genève 1922.
13 Ĵ * ERNEST NAVILLE, filozofo kaj mondlingvano, en Genève 1816.
14 V Nova Luno. Nikaragua Nacia Festo.
15 S Hebrea Novjaro. Nacia Festo de Guatemalo, Honduraso, Kostariko, Salvadoro.
16 D Meksika Nacia Soleno. Svisa Federa Fasto.
17 L * CONDORCET, enciklopedisto kaj mondlingvano, 1743.
18 M Ĉila Nacia Festo.
19 Mk Sa Januaro.
20 Ĵ Japana Aŭtunfesto. † E. BOIRAC 1917.
21 V Kunsido de la Ligo de Nacioj akzeptas raporton pri Esp., 1921.
22 S Unua Kvarono. Sa Maurico.
23 D Aŭtuna Ekvinokto. † L. BOLLACK 1925.
24 L Hebrea Fasto. Esp. grupo en Valencia fond. 1903.
25 M † V. FILIPOVIĆ, rusa pioniro, Odessa 1901.
26 Mk Dana Reĝofesto. Unua Bohemo Esp. Kongreso 1909.
27 Ĵ Saj Kosmo kaj Damiano.
28 V Ĉehoslovaka Festo de Sa Venceslavo.
29 S Plena Luno. Tenda Festo Hebrea. Sa Miĥaelo.
30 D Sa Hieronimo. * E. CONDILLAC 1714.

1928-X Oktobro

1 L Sa Remigio. * HECTOR HODLER 1887.
2 M † J. SUDRE, mondlingvisto, 1862.
3 Mk Bulgara Reĝofesto.
4 Ĵ Sa Francisko Asiza.
5 V Portugala Nacia Soleno. Sa Placido.
6 S Lasta Kvarono. Unua Esp. Societo en Siberio 1901.
7 D Hebrea Festo pri la Leĝo.
8 L Egipta Reĝofesto.
9 M Universala Poŝta Unio fondita en Bern 1874.
10 Mk Nacia Festo Ĉina kaj Kuba.
11 Ĵ
12 V Tutamerika Festo (pri Kolumbo).
13 S Nova Luno.
14 D Sa Kalisto. Brita Esp. Asocio fondita en London 1904.
15 L Bolivia Esp. Societo fondita 1905.
16 M
17 Mk Japana Rikoltdanka Festo.
18 Ĵ Sa Luko.
19 V
20 S Brunsviga Ministro aprobas Esp., 1920.
21 D Unua Kvarono. Sa Ursulino.
22 L Aŭstralia Jarkunveno, Melbourne 1918.
23 M Esp. societo fondita en Arĥangelsk 1898.
24 Mk Hispana Reĝinfesto. Islama Festo: Naskiĝo de Alio.
25 Ĵ Marsignala Kodo adoptita oficiale, 1862.
26 V
27 S † Majoro Cox, brita pioniro, 1909.
28 D Plena Luno. Ĉehoslovaka kaj Venezuela Nacia Soleno.
29 L Turka Respublika Festo. † HENRI DOR 1912.
30 M
31 Mk Interparlamenta Unuiĝo fondita 1888.

1928-XI Novembro

1 Ĵ Ĉiuj Sanktuloj. Liberia Danktago.
2 V Reformacia Festo. Mortintmemoro de Brazilo, Urugvajo.
3 S Panama Respublika Festo.
4 D Lasta Kvarono. Itala Venkfesto.
5 L Angla Tago de "Guy Fawkes". Turka Nacia Soleno.
6 M Sveda Nacia Soleno.
7 Mk Soveta Festo de Revolucio. † W. TROMPETER, germana pioniro, 1901.
8 Ĵ Siama Reĝofesto.
9 V Sa Teodoro.
10 S Estona Patronfesto de Sa Marteno.
11 D Festo de l'armistico. Belga Popolfesto de Sa Marteno.
12 L Nova Luno. Parta Suneklipso. Aŭstria Respublika Festo.
13 M
14 Mk † LEIBNIZ 1716.
15 Ĵ Nacia Festo en Brazilo kaj Siamo. † JAN KOMENSKY 1670.
16 V
17 S
18 D Latva Liberfesto.
19 L Brazila Standardfesto. Sa Elizabeto.
20 M Unua Kvarono. Letero pri mondlingvo de Descartes al Mersennes 1629.
21 Mk Prezento de Maria. * VOLTAIRE.
22 Ĵ
23 V Japana Danka Rikoltfesto. Sa Klemento.
24 S Ĉila Esp. Asocio fondita 1907.
25 D Paragvaja Konstitucia Soleno. Sa Katarina.
26 L
27 M Plena Luno. Tuta Luneklipso. Belga Nacia Festo.
28 Mk Albana Liberfesto. Panama Nacia Soleno.
29 Ĵ Popola Noktfesto en Ruslando.
30 V Sa Andreo.

1928-XII **Decembro**

1 S Nacia Soleno de Islando, Portugalo, Sudslavio.
2 D Advento.
3 L Lihtenŝtejna Patronfesto de Sa Luko.
4 M Lasta Kvarono.
5 Mk
6 Ĵ Slava Patronfesto de Maristoj. Finna Nacia Soleno. Sa Nikolao.
7 V Kuba Herofesto. † KLARA ZAMENHOF 1924.
8 S Urugvaja Banfesto. Hebrea Templofesto. Koncepto de Maria.
9 D Unua ĉeha klubo fondita en Praha 1902.
10 L Panama Memorsoleno de Bolivar.
11 M Ĝeneva Nacia Festo de l'„Eskalado".
12 Mk Nova Luno.
13 Ĵ Sa Lucia. Kortumo de Internacia Justeco fondita 1920.
14 V
15 S Zamenhofa Festo. * L. ZAMENHOF en Bielostok 1859.
16 D Komisiono de la Ligo de Nacioj ekzamenas Esp., 1920.
17 L Sudslava Reĝofesto. "Lingwe Uniwersala" festita de ZAMENHOF en Varsovio 1878.
18 M
19 Mk
20 Ĵ Unua Kvarono. Bulgara Ministro rekomendas Esp., 1920.
21 V Sa Tomaso.
22 S Vintra Sunhalto.
23 D Latina Mona Unio inter 5 regnoj, 1865.
24 L Tutslava Soleno pri Sunreveno.
25 M Kristnasko: tuteŭropa familia festo.
26 Mk Plena Luno. † G. ROBIN, rumana pioniro, 1911.
27 Ĵ Sa Joano.
28 V Savoja Esp. grupo fondita en Samoëns 1900.
29 S
30 D
31 L Jarfino. Sa Silvestro.

Historio de la Civilizacio.

La natura leĝo de evoluo, trovita de *Lamarck* kaj *Darwin* — per zoologiaj studoj —, estis poste aplikata en botaniko, astrofiziko kaj fine en antropologio. Tial, la nova scienca historio de la civilizado prezentiĝas kiel lasta, plej komplikita kaj samtempe plej interesa, apliko de la evoluada leĝo al la homaro — konsiderata laŭ la sinsekvado de la tempoj, aĝoj, periodoj. Do, la leganto bonvolu trovi en subaj kvazaŭ izolaj bildetoj la kaŝitan lig-fadenon, kiu unuigas ĉiujn stadojn de la homara historio, farante el ĝi historion de la homa familio en ĝia lukto interna kaj ekstera, kontraŭ homoj, bestoj, naturaj agentoj.

Terciara homo. Hezitanta pri la antaŭa periodo, la paleontologia scienco trovis restaĵojn de la homo en pliocena formacio, lasta en la terciara epoko. Tiutempe Eŭropo estis kovrita de abunda kreskaĵaro, virgaj praarbaroj, marĉoj, lagoj. Varma klimato de tiu epoko ebligis la ekzistadon de rinoceroj, tapiroj, krokodiloj, praelefantoj (mastodontoj), leonoj kaj cent aliaj bestoj. Malforta aspektis inter tiuj timigaj bestoj la nuda homo, malgracia, kurbdorsa, kun elstaranta suba makzelo, flavhaŭta kaj ruĝhara. Kabano farita el branĉoj estas rifuĝejo por li, lia virino kaj liaj etuloj. Korpe malpli forta ol la bestoj lin ĉirkaŭantaj li havas kontraŭ ili la avantaĝon de la penso. Li kreas armojn kaj ilojn por la lukto: *skrapilo* en formo de silika splito; *truigilo* el la sama ŝtono, kelkaj akrerandaj pecoj ligitaj ĉe la fino de bastonoj. Tiel li povas ĉasi estaĵojn pli fortajn ol li. Krome, la abunda vegetaĵaro al li havigas aldonajn nutraĵojn. Ankoraŭ ne ekzistas la arto, ĉar lia tuta intelekto absorbiĝas per la batalo kontraŭ la rabbestoj, per la lukto kontraŭ la veteraj elementoj. Sed la fajron li jam konas el la arbobruloj okazigataj de la fulmo.

Aĝo de kruda ŝtono. Kun la kvaternara epoko, en kiu ankaŭ ni ankoraŭ vivas, komencas la unua civilizado: industriado, arta ornamo de la korpo kaj de la ilaro, sociaj regulaj rilatoj, ĉio ankoraŭ rudimenta, prova, mallerta.

Samtempe, la klimato malvarmiĝas, la temperaturo falas, aperas glaciaro sur la montoj. La homo estas devigata sin vesti, konstrui solidajn kabanojn, ofte uzi la fajron, — tiuj urĝaj naturaj bezonoj puŝas lin al la intensa laboro, zorgo, elpensado, el kio rezultas rapida progreso de ĉiuj metioj, industrioj, procedoj. Paralele, la homo plimultiĝas, kaj tial nia scienco trovas plioftajn restaĵojn de la krudŝtona kulturo en *Chelles, Moustier, Madeleine, Cro-Magnon*, kaj aliloke. Armiloj kaj instrumentoj, trovitaj miloble, distingiĝas de la terciaraj iloj per sia grandeco kaj pli lerta laboro. Al hakiloj, skrapiloj, segiloj, tranĉiloj el ŝtono aldoniĝas ostaj instrumentoj — kudriloj, sagpintoj, alenoj. Mezkreska, sed muskolforta, la homo daŭrigas la ĉasadon kaj

la fiŝkaptadon. Ankoraŭ nekapabla konstrui verajn domojn li profitas ĉion, kion la naturo prezentas al li: grotojn, kavernojn, tertruojn. Tie li vivas jam multenombre, en grupoj, familioj.

Liaj vestoj estas el la felo, lerte eltranĉita kaj kunkudrita per tendenoj. En liberaj momentoj li amuzas sin skulptante rokon, kiu jam nature similis al iu besto aŭ homo, kaj li ornamas ostajn ilojn je surgratataj desegnoj, kiuj prezentas objektojn de liaj konstantaj revoj: cervoj, ĉevaloj, mamutoj.

Aĝo de polurita ŝtono. Pli kaj pli mastro en sia medio — la homo de tiu nova epoko (neolitika) kompletigas la ĉasadon per edukado de kaptitaj brutoj — bovidoj, porkoj, ĉevaloj, kapridoj. Al la kolektataj sovaĝaj fruktoj li aldonas produktojn de la komenca kulturado de tritiko, sekalo, aveno, spelto, milio, rapo, napo, brasiko, pom-, pir- kaj prunarbo. La grotoj estas plikomfortaj, la kabanoj fariĝas domoj, apud la lagaj bordoj leviĝas vilaĝoj, konstruitaj sur palisaro, sufiĉe malproksime de la bordoj — por eviti rabbestojn, kaj sufiĉe alte super la akvo por ne esti inundataj. La nombro da iloj pliriĉiĝas je fosilo, pioĉo, borilo, arketo por produkti fajron, vazaro el bakita argilo, retoj el urtika fadeno. Estas tute certe ke la neolitika homo ekspluatis minojn da ŝtono, eĉ organizis interŝanĝan komercon de tiu ŝtono, utila por industrio. La arto progresis per virinaj ŝtofaj teksaĵoj kaj brodaĵoj, kolringoj, kolĉenetoj, manringoj, franĝoj el ledo kaj kernetoj. Artefaritaj grotoj, dolmenoj, menhiroj, kromlekoj kaj tomboj atestas nun al ni pri tiu epoko.

Aĝo de metalo. Kontraŭ la klasika opinio ke la fero estis unua industria metalo — la nuna scienco eltrovis ke ĝi estis la kupro, *bronzo*, metalo kiun la homo unue prilaboris per fando kaj martelado. Tiel aperis multegaj bronzaj hakiloj, glavoj, kudriloj, pingloj, kolĉenoj, braceletoj, orelringoj, manringoj, tranĉiloj, sonoriletoj, statuetoj, kaldronoj, glasoj, ktp. Tiu bronza industrio floris nur en kelkaj privilegiaj regionoj, ĉe kelkaj triboj, kiujn la naturo lokigis en speciale favoraj cirkonstancoj, apud kupraj minejoj. Sed la fabrikaĵoj de tiu industrio rapide disvastiĝis de mano al mano, de gento al gento, kontribuante al la komercaj rilatoj, sed ankaŭ al la . . . organizita milito de metale armitaj triboj kontraŭ la ŝtonarmitoj aŭ la ligne armitaj arbaruloj. Hundo kaj ĉevalo en tiu epoko fariĝas servantoj de la ĉasanto kaj militisto. La vilaĝoj estas ŝirmitaj per altaj palisaroj, bariloj, remparoj aŭ ŝtonaj muroj — ili estas do la unuaj "urboj". Samtempe disvolviĝas serĉado de arĝento, oro, sukceno, multekosta ŝtonetaro; tiel kreiĝas speco de oportuna interŝanĝilo, ĝermo de "mono". Aliaj metaloj fariĝas kutimaj al la industrio: stano, plumbo, kaj ĉefe fero, kies kvalitoj superas tiujn de la bronzo. Kun la fera industrio la homo eniras jam en la historian periodon, kiu postlasis al ni la skribitajn dokumentojn.

Trogloditismo, t. e. kaverna vivmaniero, ne prezentas specialan epokon, sed ĉiam ekzistis en kelkaj montaj kaj apudmontaj regionoj tra ĉiuj aĝoj — terciara, krudŝtona, polurŝtona, metala, same kiel surpalisa vivmaniero de lagaj loĝantoj. En Egipto, Tibeto kaj Hindio la trogloditismo atingis sian plej perfektan stadon sub la formo de subteraj temploj, sanktejoj kaj lukse ornamitaj grotoj. Unu groto ne ebligas ankoraŭ la trogloditismon, — por tio necesas tuta aro, sistemo da grotoj, tuta monto interne truigita je ĉeloj, alveoloj, kiel mielujo de abeloj, aŭ formikejo kun ĝia reto da koridoroj, salonoj, haloj, ĉambretoj, provizejoj. Tiel, tuta vilaĝo da trogloditoj povis vivi en unu monto aŭ rokteraso, traborita je internaj loĝejoj.

Egipto. Preterirante la plej antikvan hom-kulturon de Ŝumerio, antaŭ nelonge eltrovitan kaj ankoraŭ ne trastuditan, ni alvenas al la Nila valo, kiu naskis specialan civilizacion, kies antikvegaj restaĵoj — religiaj monumentoj kaj hieroglifoj — estis ĝis nun unuaj datumitaj dokumentoj de la homa kulturo. Palisaraj vilaĝoj de *Menzaleh*, trogloditaĵoj de *Elefanta*, estas postesignoj de la antaŭhistoria Egipto, kiam brutedukado kaj terkulturo jam prosperis, pli ol 6000 jaroj antaŭ nia epoko. Sed poste, abunde disfloras monarkia-religia absolutismo, kun siaj 26 Dinastioj, kiu organizas la socian vivon laŭ rigidaj formoj. Milionoj da indiĝenoj kaj enmigrintoj sklave laboregas ne nur por havigi mirindan lukson al la aristokratio, riĉan potencon al la pastra kasto, fortegon al la militistaro, sed ankaŭ por starigi kolosajn statuojn, vastajn templojn, gigantajn sfinksojn, obeliskojn, kaj montosimilajn piramidojn, kiuj kaŝis en siaj profundaj sekretejoj la mumiojn de la faraonoj. Dum sia plej granda potenco la Egipta Imperio etendiĝis de Etiopio ĝis Kaspia maro. Egiptaj dioj, sub aliaj nomoj, penetris en Helladon, Romon, Okcidentan Azion, kaj fine en diversajn grandajn religiojn.

Kalde-Asiria kulturo. En vasta kaj fruktoriĉa Mezopotamio, inter Tigro kaj Eŭfrato, sur mildeklimata ebenaĵo kie briko ludis rolon de ŝtono, kreiĝis alia fokuso de regne organizita kulturo, kiu postlasis al ni ĉefe la militsciencon, astronomion, komercan matematikon. La pastraro tie multe riĉiĝis per astrologio, sorĉa antaŭdirado, bazita sur observado de steloj. El tiu lando eliris ankaŭ Hebrea popolo, kiu poste fondis novajn religiojn en Palestino. Babilonio kun la ĉefurbo Babilono, konstruita eble sur restaĵoj de "Babela Turo", estis nur parto de la tuta Mezopotamio, kies nordo nomiĝis Asirio. Du aliaj urbegoj de tiu regiono postlasis al ni grandiozajn ruinojn: Palmiro kaj Ninivo. Asiria militarto estis alprenita ĉe Persoj, kiuj okupis najbaran regionon. Dum multaj jaroj, pasigitaj en Babilonio, la militkaptitaj hebreoj iom lernis ĉe persaj magoj tie popularaj, kaj post ilia liberigo la hebrea Jerusalemo ekkonis dogmojn pri senmorta animo, anĝela hierarkio kaj origino de Satano. "Pendantaj ĝardenoj" de la reĝino Semiramido kaj grandiozaj

orgioj de Sardanapalo eniris n'ajn proverbojn, same kiel riĉaĵoj de Krezuso.

Fenica civilizacio, sub kies nomo oni ĝenerale miksas kune plurajn kulturojn de Fenicio, Sirio, Malgrandazia marbordo kaj insularo, estis la unua kiu disvolvis en Mezmara regiono la komercan navigadon, kaj trafikon per grandaj galeroj Tiu popoleto estis samtempe marista kaj komercista, kaj oni atribuas al ĝi, eble sen sufiĉaj pruvoj, eltrovon de vitro kaj fonetika alfabeto. Verŝajne la Fenicoj nur disvastigis eltrovaĵojn de la najbaraj popoloj, kiel poste faris Araboj. Sidon, Tir, Marseille kaj Kartageno estis ĉefaj havenoj de iliaj multaj kolonioj. En nuna dialekto Malta la fenicaj vortoj postvivas ankoraŭ, miksitaj kun la latinaj kaj arabaj. La Fenicoj jam praktikis "serian fabrikadon", librotenadon, akcian entreprenadon kaj anonimajn societojn.

Hinda civilizacio, kiu komencis 6000 antaŭ Kristo, okupas ne unuan lokon en la historio nur pro manko kaj malfrua apero de la skribaj dokumentoj. Aria branĉa de la hindeŭropa familio, frue veninta el Orienta Eŭropo al Irano, naskis multajn naciojn, el kiuj la ĉefaj estis toĥara, persa kaj hinda. Tiu lasta baldaŭ forlasis Iranon por okupi ankoraŭ pli sudajn landojn — Penĝabon kaj Dekanon ĝis la montaro Vindia, kiu gardas la originan prahomon de la nuna "India" aŭ "Hindustan". En tiu mirinda popolo kreiĝis lingvo, kies literatura formo estas la sanskrito, kiu servis por pastroj, scienculoj kaj poetoj dum 3000 jaroj, kaj servas ankoraŭ nun. La kvar Vedoj, sanktaj libroj de la hindoj, jam eldiris — laŭ Max Müller — ĉion kion diris, diras kaj diros ĉiuj filozofoj de la mondo. La kvar kastoj, organizitaj por la komuna bono, sur la bazo de faka specialiĝo, labordivido kaj heredeco de talentoj, estis kadroj de la antikva Hindujo: bramanoj-pastroj, kŝatroj-militistoj, vajsioj-produktistoj kaj sudroj-servistoj. Ĉiuj ceteraj eksterkastuloj estis "paria'oj". Unue pure filozofia — la religio de Vedoj, iom post iom, populariĝis sub formo de multedia sistemo, kie regis la "Trimurti" — Brama, Viŝnu, Ŝivam, kies nomoj — per la lastaj literoj — havigis la faman "Aum", sanktan vorton, iom analogian al la kristana "amen". En VIIa jarcento antaŭ Kristo la princo Gautama Ŝakja Muni, kromnomita "Budha", volis reformi la oficialan Bramanismon, nuligi la kastojn, malaperigi sangoferojn. Se tiu reformo fiaskis en Hindujo mem, ĝi tamen tre disvastiĝis kiel nova religio en Ceylono, Tibeto, Mongolio. Ĉin- kaj Japanlandoj. Multe da hindaj eltrovaĵoj penetris ĉien, ĝis Eŭropo: t. n. "arabaj" ciferoj, ŝakludo, literatura formo de fabloj, teatraĵoj, diversaj legomoj, spicoj kaj ŝtofoj. Unua scienco de ĉinoj. koreanoj kaj japanoj estis fondita de hindaj saĝuloj, kaj pri tio atestas, ekzemple, la sanskrita vorto "mandarin" (saĝulo) kiu nun signifas altan oficiston en Ĉinio. Dividita je kastoj, izolaj regnetoj, konsistanta el cent diversaj gentoj, multlingva kaj multsekta Hindujo, krom ĉio ankaŭ trodorlotata de la varma klimato, neniam

estis forta en politika senco, kaj ĉiam estis viktimo de tiu aŭ alia militema popolo. Post Aleksandro Macedona kaj Granda Mogolo — ĝi fine fariĝis la plej brila perlo en la Brita krono.

Persa civilizacio prezentis ion mezan inter la greka kaj hinda, inter la skita kaj asiria kulturoj, posedante tamen kelkajn originalajn trajtojn. En VIa jarcento antaŭ Kristo la Persa Imperio ekregis la tutan Okcidentan Azion. Estis verdire granda miksaĵo da popoloj kaj influoj tiu "persa" ŝtato: egipta administrado, asiria militarismo kaj konstruarto, fenica ŝiparo, kaldea scienco, aria filozofio. La dualisma religio kun du egalfortaj dioj — blanka Ormuzd kaj nigra Ariman — estis produkto de persa genio, enkorpita plej klare en la profeto *Zaratuŝtra*, kies nomo kripliĝis poste je Zoroastro. Multe da bonaj doktrinoj persaj trafiltriĝis ĝis Palestino, kaj de tie en la grandajn religiojn de nia tempo. La "satrapismo" kiu senmezure disblovis la persan imperion, ĝin ankaŭ pereigis. Maratona venko proklamis la novan kulturon de hellenoj (pragrekoj).

Greka civilizacio. Post la venko kontraŭ Persoj la torĉo de la civilizacio Eŭropa apartenas al Grekoj, pli konataj tiutempe sub la nomo "Hellenoj", "blondbuklaj" kiel ofte karakterizas ilin Homero. La Hellado kribras, filtras, kunordigas, harmonie reduktas la orientajn elementojn, plejparte malproporciajn kaj troigitajn. Artistoj kaj intelektuloj antaŭ ĉio, la Grekoj dum du jarcentoj, post Solono kaj ĝis la morto de Aleksandro, kreas preskaŭ ĉion, kio igis glora ilian patrujon. Demokratio kaj pacifismo floras malgraŭ la militaj aventuroj. Kiom de arto, tiom de libereco estis plena Grekujo: la "Filipikoj" valoras same kiel la statuoj de Fidias. La respondeca civitano perfekte konas siajn rajtojn kaj devojn. Gracia mitologio, nutraĵo por poetoj, poezio de sanktaj misterioj, majesta Homero kaj tragedia Eskilo, profunda filozofio de Sokrato, Platono, Aristotelo, prudenta Areopago kaj frivola Aspazio, Olimpiaj ludoj kaj paroladoj sur Agora, ĉio tio kaj mil aliaj mirindaĵoj, jen — kion ne povis venki la venkintoj de Grekujo, Romanoj. Jam venkita, ĝi daŭrigis instrui la mondon. Tuta nia moderna scienco kaj tekniko, bazitaj sur matematiko, estas idoj de Pitagoro kaj Eŭklido. Alfabetoj de ĉiuj eŭrop-amerikaj nacioj, ĉu latindevenaj, ĉu kirilaj, estas filoj de la hellena. Kiam Edison aŭ Marconi ion elpensas, ili ĝin nomas per grekaj vortoj: fonografo, radiotelegrafio, mikrofono, ktp. Kaj kiel eterna simbolo de la eterne juna spirito Hellena restas, nun admirata en Louvre, la statuo de Venuso Milosa, la plej ĉasta el ĉiuj venusoj, venkita de la tempo, sen unu brako, sed nevenkita spirite, ĉar ĝi restas ĝis nun nesuperita ĉefverko de nekonata hellena artisto.

Roma civilizacio. Portate de Oriento al Okcidento la torĉo de klereco el Hellado venis al Latiumo, kerno de Roma Imperio. Krom la milita forto, ĉio cetera en Romo estis ĉerpita el Hellado kaj Etrurio,

filino de Hellado. La lingvo latina mem estis penetrita je hellenaj elementoj. Roma Imperio fondis sian grandecon sur la ruinoj de venkitaj Keltoj aŭ Galloj, Venetoj, Liguroj, Iberoj, Etruskoj, Alobrogoj, Dakoj, Iliroj kaj cent aliaj gentoj. Laŭ la sprita parolo de Heine la romanoj kreis admirindan sistemon de juro por morale fiksi ĉion rabitan. Sed el tiu perforto naskiĝis ankaŭ io bona. La strategiaj ŝoseoj kaj pontoj romanaj fariĝis baldaŭ komercaj vojoj de nova kulturo. La perfortitaj popoloj, kiuj devis akcepti latinan lingvon, sin venĝis tiel ke ili kripligis, transformis ĝin ĉiu siamaniere; tiel naskiĝis la lingvoj: itala, franca, kataluna, hispana, portugala, provenca, ladina, cincara, valaka, moldava, rumana, . . . Nuna Francujo, Germanio kaj Italio estas heredintoj de Roma Imperio kun ĝia spirito, organizo kaj literaturo. Alia heredinto — la Katolika Eklezio — post miljara regado, ankoraŭ nun estas potenca kaj riĉa. Roma kulturo penetris Nordan Afrikon, Nigran Maron, Britan insularon kaj Centran Germanion.

El tiu kirlado de popoloj formiĝis moderna kosmopolita spirito, kiu kondukis al la Franca Revolucio kaj al la lasta kirlado de jaroj 1911—1919. Nia lingvo konsistas je $^3/_4$ el latinaj elementoj, sed kiom malproksima estas nia ideo de "paco" de la "Pax Romana". . .

Kristanismo. Antikvaj doktrinoj de Hindoj, Persoj kaj Egiptanoj, koncentritaj en malgranda Palestino, rezultigis intensan fermentadon de spiritoj: oni parolis pri la liberigo de Judeo. pri la rekonstruo de Jerusalema templo, pri la nova Ciono, sed ankaŭ oni atendis Mesion, Filon de Dio. En tiu fokuso de spirita bolado, je la fino de la Roma regado, naskiĝis vera Mesio, Kristo, kies parolo pri la "Regno de Dio" ekflugis trans la limojn de la regnoj de homoj. Post tri jarcentoj la nova religio estis akceptita ĉe la registaroj, kiam ĝi jam akceptiĝis ĉe la popoloj. Ne nur moralan revolucion faris la Kristanismo, ĝi volis ankaŭ organizi. Kaj dum 1000 jaroj de la Mezepoko la tiaro superregis la kronon. Dum la samaj mil jaroj la pastroj estis solaj homoj kiuj sciis legi kaj skribi, kaj dum postaj jarcentoj ili estis solaj instruistoj de la popolo. Oni povas diri ke la Eklezio kreis la naciajn movadojn, ĉar ĝi komencis traduki kaj presigi Evangelion kaj Biblion en ĉiuj naciaj dialektoj, por doni la eblecon de la kompreno; ja antaŭe la sanktaj skriboj ekzistis nur en la hebrea, greka kaj latina. El tiu tradukado naskiĝis kompara filologio kaj la nuna lingvistiko. Oni malpravas dirante, ke Esperantaj lernolibroj ekzistas por 47 naciaj lingvoj, — ili ekzistas por 800 lingvoj kaj dialektoj . . . ĉar tiomaj estas la tradukoj de Evangelio. Ja sufiĉas preni Esperantan Novan Testamenton kun Nova Testamento en koncerna nacia lingvo — por havi kompletan lernilon je du paralelaj tekstoj.

Bizanta civilizacio. La morto de Teodosio, en 395 post Kristo, disfendis la Roman Imperion je du partoj: Okcidenta imperio, kaj Orienta imperio kun la ĉefurbo Konstantinoplo (Bizanto). Dume la unua estis pereanta sub la invadoj barbaraj, la dua sukcesis prosperi pli ol 1000 jaroj, ĝis la turka almilito en 1453. El tiu duonigo politika rezultiĝis en 1054 la skismo religia — aperis du formoj de la Kristanismo: Katolika, t. e. "universala", en Romo, kaj Ortodoksa, t. e. "verkredanta" en Bizanto. La Orienta Kristanismo organiziĝas en "Grek-Ortodoksan" Eklezion, kiu entenas balkananojn, rumanojn (valakojn kaj moldavojn), kaŭkazanojn, koptojn, rusojn kaj ukrainanojn, sur vasta spaco de Adria Maro ĝis Pacifiko, de Egipto ĝis Glacia Oceano. Kiel doktrino, la Bizantismo famiĝis per siaj subtilaĵoj, disputoj kaj herezoj, kulto de eksteraj detaloj kaj formalismo . . . pli ol per sia bonaj flankoj: sincera mistiko kaj filantropio. Post la falo de Konstantinoplo la spirita centro de Bizantismo translokiĝas al Kievo kaj Moskvo. En konstruarto la Bizantismo unuigis la romanan kaj araban stilon, aldonante riĉecon de ornamentoj kaj eksteran multekolorecon, kvazaŭ simbolantan la diversgentan miksaĵon de la ortodoksularo.

Migrado de barbaroj. Hellenoj, romanoj, keltoj unue estis barbaroj almigrintaj, kaj poste fariĝis civilizitaj civitanoj de la "Pax Romana". La memoro pri ilia migrado jam elvaporiĝis, kiam okazis denova migrado de aziaj gentoj, kiuj puŝis survoje ankaŭ eŭropajn popolojn; tiel komencis en la IV^{a} jarcento post Kristo rea migrado de la popoloj. Gotoj, Vandaloj, Slavoj, Hunoj, Frankoj, Anglo-Saksoj ŝanĝas sian lokon, almilitas, detruos, fondas, konstruas. Ŝajnas ke la civilizacio pereas, sed ĝi nur varias, ĉar la hieraŭaj barbaroj starigas novan ordon, el kiu naskiĝas modernaj regnoj. La barbara sango estis necesa por refortigi la kadukajn, degeneritajn civitanojn de Roma imperio. Cetere, la lernantoj nur imitis siajn majstrojn, la barbaroj ja lernis de la romanoj la arton militi kaj almiliti. Invado de araboj kaj turkoj estis lastaj ondoj de tiu jarmila migrado, kaj la nuna hungara oazo, la plej okcidenta azia kolonio, atestas pri la granda skalo de la iama migrado.

Araba civilizacio. Dum la religio de Budha, profunde pacema, vastiĝis de koro al koro, super la regnaj limoj, nur per sia spirita potenco, la religio de Mahomet (Muhhamed) — naskita 1000 jaroj poste — estis esprimo de militanta materia forto. Islamiĝu, aŭ pereu sub la "verkreda" glavo — tia estis la devizo de mahometanoj. Al la obeintoj ili permesis havi multajn edzinojn, kaj promesis postmortan paradizon kun belaj virgulinoj kaj ĉiuj dolĉaĵoj de materia vivo. Tiel Islamo sukcesis vastiĝi kun fulma rapideco — de Arabio ĝis Maroko, Sudano, Somalio, ĝis Hindujo, Malako, Turkestano, ĝis Bosnio, Krimeo, Kaŭkazo, Volgo, Uralo. Tiuj cent gentoj do lernis la araban por legi Koranon en originalo, ĉar estis malpermesite ĝin traduki en malpuraj lingvoj. *Poitiers* en Francujo kaj *Wien* en Aŭstrio estis ekstremaj punktoj de la militanta Islamo. Araboj renovigis sciencon kaj filozofion

en dormanta Mezepoka Eŭropo. Astronomio, alkemio, matematiko, ferindustrio, ŝtofteksado, arkitekturo prosperis ĉe ili, influante la najbarojn. Post ruiniĝo de Arabio la ĉefa rolo en Islamo apartenis al sultanoj de Konstantinoplo, ĝis la lasta milito. Nun la centroj de Islamo troviĝas en Heĝaso kaj Turkestano.

Ĉina civilizacio. Konfuce' (latinigita "Confucius"), la ĉina saĝulo, atestas pri la popolo kun alta stato de kulturo kaj monarkia organizo, jam 2000 jaroj antaŭ Kristo. Multaj eltrovaĵoj, kiujn fieraj eŭropanoj atribuas al si, ekzistis jam delonge en Ĉinujo: tipografio, busolo, pulvo, horloĝo, papermono, ĵurnalismo. Terkulturo estis ĉefa kaj sankta okupo de la paca popolo, kiu ne volis eksterajn almilitojn malgraŭ la ekstrema denseco de la loĝantaro. Por ŝirmi sin kontraŭ nordaj rabemaj gentoj la ĉinoj konstruis la muron, longan preskaŭ 3000 km, kiu fariĝis proverba kiel simbolo de la ĉina konservemo. Budhismo kaj Laoce-ismo, venintaj el Hindujo, nenion ŝanĝis en la materia organizo de la regno. Cent mil "mandarenoj", solaj posedantoj de la ĉina ideografio, regis je la nomo de la imperiestro. En tiu homa formikejo dense vivis preskaŭ $^1/_4$ de la homaro, neniel simila al la blankuloj de Eŭropo kaj nigruloj de Afriko. Eĉ inter la flavaj aziaj rasoj la ĉinoj okupis apartan lokon. Laŭ sia antikveco, kolosa grandeco ili rajtis sin nomi "Centra Regno", sed ankaŭ "Ĉiela Imperio" estis ilia titolo, malgraŭ la ekstreme teraj, materiaj instinktoj de la raso. Kun la hindoj, ili formis du ekstremajn polusojn de azia spirito: tre materialista kaj tre idealista. Nur en la XIII[a] jarcento post Kristo la dalmato Marko Polo konigis al Eŭropo tiun antaŭe misteran landon, kies origina nomo estis unue "Cin" (Tsing). Post la Boksera ribelo en 1900, kiam eŭropanoj faris mil krimojn kontraŭ civila loĝantaro en Ĉinujo, la "Ĉiela Imperio" eniras en revolucian periodon de sia evoluo, kiu daŭros verŝajne ankoraŭ dum jardekoj. Provoj de intima unuiĝo inter Sovetio kaj Ĉinujo, kiuj tremigas eŭropajn diplomatojn, povas profunde aliigi la mondan politikon, se ili sukcesos. Tiuokaze la Tutazia Federacio ne estas plu ĥimeraĵo. Atendante, la eŭropanoj ĝuas la ĉinan teon en ĉinaj porcelanaĵoj, kaj entuziasmiĝas ĉe la plej moda "ma-ĵong", ĉina ludo, kiu antaŭe estis monopolo de la imperia dinastio, sub la minaco de mortopuno.

Japana civilizacio. Kun siaj 60 milionoj da loĝantoj kaj sia limigita insularo, Japanujo (Niphongo) ne pretendas al iu tutmonda, aŭ eĉ al iu tutkontinenta rolo. Gia kulturo estas nur loka, kaj ĝia influo estas minima. Sed en la ĝenerala bildo de la homaro la japana popolo donas tre originalan, interesan trajton. Tiuj insulaj maristoj, fiŝistoj kaj terkulturantoj, izolitaj de la cetera homaro, akiris mirindan materian kaj etikan kulturon, kies kuriozaj ekzemploj estas "samurai" — feuda nobelaro "ĥarakiri" — sinofera memmortigo, kulto de floroj, domoj-ludiletoj sur vulkana ĉiam tremanta tero. En scienco kaj literaturo ili estis disĉiploj de ĉinoj kaj hindoj, eble de antikvaj toĥaroj. Sed, male je la ĉina konservemo, la fatalistaj japanoj tuj akceptis la eŭropan teknikon, kiam ili komprenis ke de ĝi dependas ilia nacia sendependeco. Nun, Japanujo posedas propran militŝiparon, modernan industrion, perfektan teknikon, okupante inter la "grandaj potencoj" kvaran lokon — post Britlando, Usono, Germanio, — antaŭ Francujo, Italio. Ekzisto de tia Japanujo estas tre grava por la estonta destino de Azio, kiu ĝis nun estis "protektata" de eŭropanoj.

Feŭda nobelaro. Post la disfalo de efemera imperio de Karolo Granda (771—800) formiĝis en Eŭropa tri apartaj regnoj: Franca, Germana, Itala, en kiuj la lukto inter pastra kaj nobela absolutismo kondukis al speciala kompromiso, en formo de "feuda" reĝimo. La Eklezio restis la plej alta aŭtoritato, sed reala estrado estis komisiita al la "kavaliroj", vasaloj, kiuj ordonis super la sklavigita popolo. Pro oftaj ribeloj la kavaliroj devis loĝi en kasteloj, ĉirkaŭitaj de altaj muroj, profundaj fosaĵoj, kaj defendataj das alajrataj militistoj, fremdaj al la loka loĝantaro. Tion tre bone simbolis agloj, falkoj, leonoj, kaj aliaj rabaj bestoj kaj rabbirdoj, prezentitaj sur la ŝildoj, blazonoj de la kavaliroj. Nur en kelkaj komercemaj urboj la metiistoj, negocistoj, ĝuis ioman liberecon en siaj gildoj. La Katolika Roma Eklezio estis la spirita reprezentanto de Dio, je kies nomo funkciis la tuta feŭda organizo. Lukto de burĝaro kaj gildaro kontraŭ la absolutismo de kavaliroj, la religia protestanta Reformo ribelanta kontraŭ Papo, la Krucmilitiroj kun siaj malordoj, fine la epidemioj de histeria mistikeco, sorĉista fanatikeco kaj kruelaĵoj de la inkvizicio — ĉio kune subfosis la feŭdan absolutismon, kiu falis kvazaŭ tromatura frukto de l'arbo skuata de ventego.

Aŭroro de nova epoko. De la XIII[a] ĝis la XV[a] jarcentoj okazas malrapidaj transformiĝoj de Eŭropa socio, kiuj preparos la modernajn tempojn. Interne de la ŝtatoj la reĝoj luktas kontraŭ feŭdaj sinjoroj, tro sendependaj, kaj celas unuigi ankoraŭ dispecigitajn provincojn. Sed la politika potenco de la Eklezio malfortiĝas, fortiriĝas. Formale, la kredo estas unuigita, sed ĝia socia funkcio ne plu estas universala. Post la militoj religiaj venas naciaj militoj. Falo de Konstantinoplo ĵetas milojn da orientanoj al Eŭropo, kie ili rifuĝas kun antikvaj manuskriptoj. Gutenberg realigas tipografion, kies ideo estis alportita de Marko Polo du jarcentojn antaŭe. En 1492 la hispanaj araboj estas venkitaj kaj Kolumbo eltrovas Mezan Amerikon, dum la Norda jam estis delonge konata al la islandaj maristoj, kiuj ne sciis ke la malgajaj nord-okcidentaj insuloj apartenas al vastega kontinento. Siaflanke, Kolumbo kredis retrovi Hindujon de okcidenta direkto, kaj tial kreiĝis erariga kutimo nomi "indianoj" la indiĝenojn de la Du Amerikoj. Postaj marvojaĝoj ankoraŭ pli vastigas la horizontojn:

Eŭropo vidas sin nur eta parto de la senlima terglobo, kaj tuj la Eklezia aŭtoritato falas, ĉar ĝi ne povis antaŭmontri la ekzistantajn kontinentojn, eltrovitajn de la maristoj. Kopernik kaj Bruno malsuprenigas la teron en la rangon de eta korpo turniĝanta ĉirkaŭ la suno: tiel ekflamas konflikto inter la scienco kaj la pastra scio. La homo komencas fidi je siaj propraj fortoj, kaj antaŭa fatalista senmoveco malaperas. Venas la "renaskiĝo" — Renesanco.

Renesanco. Ĝi estis renaskiĝo de l'antikva pagana idealo de l' bela nuda homo, forta, sana, sprita, libera, do ĉiel supera al la mezepoka anemia ulo, ŝarĝita jen de kiraso, je de haraĵa nigra vestaĵo. Ĝi estis intelekta revolucio de scivola libera spirito kontraŭ polvoplena tradiciismo de retrograda, mallarĝa skolastiko. La gracia hellena genio kunigita kun firma pozitivismo romana, la skeptika studo anstataŭ blinda obeo al la aŭtoritato, la belartoj kaj plensuka nacia literaturo apud la askeismo kaj nurdogma eklezia ekzegezo. Ĉiuj klasoj de okcidenteŭropa socio vekiĝis, kaj volis per la duobla aktiveco rekompenci la longan dormadon dum Mezepoko. La studo de latina kaj greka lingvoj rekomenciĝis, sed ĉifoje ne per la ekleziaj libroj, sed per la literaturaj, historiaj, sciencaj verkoj. Precipe disfloris la produktado de poetoj, muzikistoj, scienculoj, skulptoroj, pentristoj. Riĉuloj, nekapablaj mem kontribui al tiu junardanta movado, fariĝas mecenoj, malavare subtenas ĉiujn, kiuj ŝajnas esti talentaj kaj laboremaj artistoj. La Eklezio estas vole-nevole trenata en tiun renovigantan movadon, kaj ni vidas pastrojn en la rolo de artistoj, poetoj kaj revoluciemaj scienculoj. Ĉiu laŭ sia povo: la benediktanoj kreas sian faman likvoron, aliaj studas stelojn aŭ tradukas grekajn pergamenojn. El Italio la Renesanco disfluis al Francujo, Aŭstrio, Germanio, k. a.

Apero de burĝaro. Mezaj kaj malaltaj klasoj de Mezepoka socio ekzistis ĉiam, sed oni ne vidas ilin sur historia scenejo de tiu tempo, ĉar temis tiam nur pri la milita kaj eklezia klasoj. Ĉio cetera estis ignorata, kiel brutaro kaj ilaro. Sed dank'al siaj gildoj, publikaj kaj sekretaj organizoj, la komerca kaj metia urbanaro fine atingis siajn rajtojn. Luktante kontraŭ la feŭda nobelaro, la reĝoj baldaŭ ekvidis ke ilia natura kunbatalanto estas la burĝaro — kaj tio realiĝis. Jam du la reĝado de Filipo Bela, en la "Ĝeneralaj Etaloj" de tiu tempo figuras ta burĝa delegitaro apud la nobela kaj pastra. Multon faris por tio la bankistoj, procentegistoj kiuj zorgis havigi la monon al militemaj princoj. Tiel la reĝoj estis volonte donantaj la privilegiojn, ĉartojn kaj diplomojn al la burĝaro. En Britlando la burĝaro evoluis ĝis la kreo de la Komununa Domo, Parlamento. En Belgio, Flandrio ĝi formis veran popolan aristokration. En Germanio formiĝis la famaj Hansa ligo, Rejna ligo, kaj en Italio la komercantaj respublikoj, kie kreiĝis la tuta bankista scienco: Venezio, Lombardio, kpt. Ankaŭ

al la komercistoj apartenas parto de la gloro eltrovi novajn terpartojn, ekzotikajn insulojn, oceanajn vojojn, kaj ne hazarde la fama kartografo *Mercator* portis nomon aludantan pri lia komerista deveno.

Monarkia reĝimo. Sed ne longe daŭris tiuj "renaskiĝoj" kaj liberecoj. La reĝa elemento en Eŭropo, interparenca, ligita per sekretaj rilatoj kaj kontraktoj, post la falo de feŭda nobelaro, nun revas subjugi ĉiujn klasojn. Malaperas provincoj, lokaj aŭtonomioj; sub la preteksto de "unuigo" la despota centralismo laboras por monarkaj interesoj. La XVII kaj XVIII jarcentoj estas periodo de absoluta monarkio, plej brile enkorpita en persono de Ludoviko XIV: la Reĝo Suno, kiu eldiris la faman: "la regno — ĝi estas mi". Nun la tri sociaj klasoj — nobelaro, eklezio, burĝaro — estas vere egalaj, egale subigitaj je la monarka arbitro. Reale regas korteganoj, ministroj, favoritoj, intrigantinoj, ĉar la reĝo sola ne kapablas koni milmil aferojn de la regna funkciado. Centro de la kortego, la reĝo — pro troigita sia potenco memfariĝas senpotenca. Dum tiuj jarcentoj Francujo estas en Eŭropo la ĉefa lando, kies lingvo, literaturo, modo, kostumo . . . estas kvazaŭ devigaj por ĉiu eminenta eŭropano. En Moskvo kaj Konstantinoplo, en Stockholm kaj Malta, egale regas franca influo. Ankaŭ milite ĝi estas la plej forta regno. Ameriko kaj Hindujo komencas fariĝi francaj kolonioj.

Carismo en Ruslando. Samtempe, en Orienta Eŭropo prepariĝas grandaj metamorfozoj. Kun surtroniĝo de Romanova dinastio la rusa imperio komencas pli intime konatiĝi kun la okcidenta kulturo. Litovoj, poloj prusoj, danoj, kiuj serĉas okupon en Moskvo, fondas unuan aktivan nobelaron en Ruslando. Kun ili transplantiĝas la materia kulturo kaj tekniko. Petro Granda, vera demokrato, iras Holandon inkognite, kaj tie kiel simpla laboristo lernas manmetiojn. Reveninte al sia trono li alvokas el ĉiuj eŭropaj landoj: metiistojn, teknikistojn, maristojn, kuracistojn, oficirojn. Li fondas ŝiparon, fabrikojn, akademiojn, laborejojn. Kun vere azia krudeco li ordonas al moskovidoj tranĉi longajn barbojn, longajn surtutojn, devigas ilin fumi, trinki bieron, porti perukojn. Li volas komenci per eksteraj detaloj por fini per spirita aliformiĝo. Petro havas strategiajn sukcesojn kontraŭ Svedoj ĉe Poltava, kontraŭ Turkoj ĉe Azov. Sed Moskvaj bojaroj tro konservemas, murmuras. Petro mortigas sian filon, animon de konservema bojara partio, kaj fondas novan ĉefurbon kun holanda nomo "Piterburh", popole "Piter". Post li, Katerino Granda, protektantino de Voltaire, Diderot, Dalembert, Leibniz, influata de tiuj filozofoj, penas eŭropigi Ruslandon. Sed ĉiuj ŝiaj penoj tuŝas nur la altajn urbajn tavolojn, — tro vasta estas multmiliona popolo rusa, vivanta ankoraŭ laŭ antikva maniero Kaj tio, kion entreprenis Petro, ne estis finita ankoraŭ 200 jaroj poste, en la revolucioj de 1905 kaj

1917. Oni rapide ŝanĝis la kadrojn, nomojn, formojn, sed la enhavo restis preskaŭ la sama. Absolutismo de caroj kaj absolutismo de komisaroj esence restis la sama, malgraŭ la materia progreso.

Parlamentismo. Brita insularo, malproksima de malnovaj klasikaj centroj, liberspirita pro sia tutmonda trafiko kaj komerco, estis la unua lando kiu ekvidis parlamentan sistemon. La protestanta reformo jam preparis grundon por tio, kaj la revolucioj de 1648 kaj 1688 timigas anglojn, kiuj ne ŝatas scenejan sangoverŝadon. Oni ja povas pace interkonsenti, sen kaptranĉado. Tiel altrudiĝis la parlamento. En Francujo ĝi estis malpli facile atingita. La prediko de grandaj enciklopedistoj kaj filozofoj en la lando mem kaj en franca Svislando preparis la spiritojn. Orgioj de la kortega absolutismo indignis la korojn. Sekvis la Revolucio, kiu tuj ekhavis tuthoman, universalan karakteron. Ĝi fondis metran sistemon kaj mirindajn sciencajn institucioj̆n. Sed tio multe kostis al Francujo mem. Nur post serio da revolucioj kaj reĝaj restarigoj kaj reaj revolucioj la franca demokratio alvenis al la ekvilibrita parlamento. Poste sekvis Italio, Belgio, Germanio, Aŭstrio, kaj la domokrata sistemo emas nun tute universaliĝi.

Usono. Naskita el holanda, franca kaj angla koloniado, la Norda Ameriko baldaŭ alprenis novan originalan aspekton. Malluma flanko de ĝia prospero restas la sorto de "ruĝhaŭtuloj", unuaj kaj naturaj landanoj. Sed pafilo superis sagarkon, kaj brando senmoraligis pacemulojn. El milionoj da indiĝenoj apenaŭ restas nun kelkmil. Post la liberigo de sklavoj la Federa Respubliko rapide kreskas, pli per la enmigrado ol per disnaskiĝo. Vaporŝipoj kaj fervojoj ebligas kolosan pligrandiĝon de Usono. Nun ĝi entenas 120 milionojn da loĝantoj, pli kaj pli unuigataj per la komuna angla dialekto. Febra konstruado, uzo de maŝinoj en pli alta grado, libera konkurenco, enmigrado de entreprenemaj volfortaj aventuristoj kaj laboremuloj el malnova Eŭropo, sangmiksado kun freŝsanaj indiĝenoj, ĉio kune rezultigis specialan tipon de "yankee" (janki) — persista en laboro, facila en fantazio, ema al religiaj sektoj, praktika kaj dolaravida. Mormonismo, scientismo, salutismo klare karakterizas tiun mentalecon. Ĉiujare Eŭropo estas superŝutata je broŝuroj pri "fino de la mondo", "nova religio", "universala frataro", ktp. Kaj ĉiujare milionoj da aŭtomobiloj, skribaparatoj, metalajoj, veturas al la eŭropa vendejaro.

Scienco kaj tekniko. Progreso de la aplikata scienco, libera esploro de scienculoj, depost la fino de XVIIIa jarcento, tute transformis la kulturan vivon. Kaj tio — unue dank'al la vapormaŝino kiu utiligis terkarbon. Fervojoj, vaporŝipoj, lokomobiloj, uzinoj — kreas intensan industrion, pograndan produktadon, kolosan kapitalon. Tio permesas salajri fakulojn, fondi faklernejojn, kio tuj sekvigas novan serion da eltrovoj: elektra industrio, radioaktiveco, turbinoj, aŭtomotoroj, aeroplanoj, petrola industrio. Kun la XIXa jarcento komencas superproduktado, elektrigado, ekspluatado de akvenergio, torfo, kaj ĝenerale aŭtomatismo. Oceanaj ŝipoj atingas kolosajn dimensiojn: ili jam estas veraj "naĝantaj urboj". La ĝenerala tendenco estas "rapidi". Strata bildo tute ŝanĝiĝis: la piediranto arkaiĝas, ŝajnas esti neutila balasto, ĝenanta la cirkuladon. Speco de mentala malsano ekkaptas nunan kulturan homon, je kies servo venas la troigita tekniko kaj freneza maŝinismo. Fulmerapida kinoprezentado, kiu anstataŭas la teatron kun aktoroj, ankoraŭ pli puŝas homojn al supraĵa kurado tra la vivo. Laŭ sprita rimarko de iu franca ĵurnalisto la nuna salona babilado konsistas en serio da klišaj demandoj kies respondojn oni ne aŭskultas, kaj eĉ ne eldiras. Tio rezultas el la maŝinigo de la vivo en grandaj urboj. Nervaj malsanoj, kolosaj epidemioj, anemio, degenerado estas unuaj simptomoj de nia "ĵarcenta malsano".

Sporta kulturo. Feliĉe, al la supre aluditaj nenormalaĵoj kontraŭstaras la sana instinkto de junularo, kiu iom-post-iom elŝiris de la lerneja disciplino la rajton "ludi". Unue, ĝi estis ribele, kaŝe aŭ hazarde, sed kun la morala malordo venis anarkio en la lerneja temdivido, toleremo, kaj fine la junularo ricevis oficialan rajton kuri, salti, pilkludi ktp. Verdire tio ne estis io nova, ĉiuj sovaĝaj kaj nekulturaj infanoj ĉiam estis liberaj tiurilate. Sed por la kultura infano grandurba ĝi estis rivelacio. Alimaniere naskiĝis sporto de plenaĝuloj. Unue tio estis manio de eltrovaĵoj pri flugmaŝinoj, bicikloj, naĝaparatoj. Poste, miloj da amatoroj ekuzis la elpensitaĵojn, kaj tiel kreiĝis serio da sportoj, kun iliaj matĉoj, turniroj, konkuroj, publikaj luktoj, vetkuradoj, olimpiaj ludoj. En ĉi tiu fako oni ankaŭ revenis al la antikva kutimo, ĉar olimpiaj ludoj ekzistis ĉe hellenoj 2000 jaroj antaŭ nia tempo. Apud la tradicia anemiema higieno kaj farmacia medikamentado kreiĝis nova higieno de nova kultura homo ĉerpanta sian sanon de la suno, freŝa aero, fizika ekzerco. Kaj la sano ja ne bezonas farmaciaĵojn. Niaj panjoj nin tro varme vestigis, malpermesis ludojn ekster la ĉambro, volis nin konservi en vato, apud forno. El tio produktiĝis nia pala, senforta generacio da "intelektuloj". Morgaŭa generacio miros pri la sinmortiga pseŭdohigieno de siaj avoj.

Monda ekvilibro. La scienca kaj industria progreso servis ne nur konstruajn, produktemajn bezonojn, — ĝi ankaŭ kontribuis al la "defendo" de la ŝtato. Sed universala defendo, kiam ĝi estas reciproka transformiĝas en universalan interbuĉadon. Se komencas militon tiu, kiu sin kredas pli forta, la egalforteco devas igi militon neebla. Sur tiu aksiomo baziĝas la "armita paco", kiu daŭras nur se la kontraŭuloj posedas egalan forton, aŭ kredas ĝin egala. Pligrandigo da bataliloj, armeoj unuflanke, provokas korespondan pligrandigon aliflanke. Al tiu neevitebla konkurado aldoniĝas partaj ligoj, aliancoj, "ententoj".

Ne nur liberemaj tendencoj kaj dinastiaj ambicioj influas al la militaj instinktoj, sed ĉefe la ekonomiaj kondiĉoj kaj financaj interdependoj. La diplomatio, lukse salajrata, nun pli kaj pli humile servas la fontojn de siaj salajroj. Sed kontraŭ la tutpotenco de la Ora Bovido leviĝas maso da ekzaltitaj proletoj, je la nomo de socialismo, komunismo, bolŝevismo.

Laborista internacio. Organizo kaj klasa konscio de laboristoj estas brila ekzemplo de la povo de ideoj, kiuj falis en la popolon kvazaŭ semoj sur la riĉan grundon. Aro da romantikaj utopiuloj: Saint-Simon, Owen, Fourier, Proudhon, Blanqui — fondis novan movadon, socialismon, kiu en rigida formo de Karl Marx alprenis aspekton de ekzakta scienco. Laŭ la socialistaj doktrinoj la historio de ĉiu socio estas la historio de klasbatalo. Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano, barono kaj servutulo, korporacia mastro kaj helpisto, unuvorte — subpremanto kaj subpremato staris en konstanta antagonismo, rilatis en kaŝa aŭ videbla interlukto. La moderna burĝa socio, elirinta el la ruinoj de feŭda sistemo, ne forigis la klasajn antagonismojn, ĝi donis nur novajn formojn al la klasbatalo. La moderna industrio transformis la etan metiejon de patriarka majstro en la grandiozan uzinon de industria kapitalisto. Amasoj da laboristoj, kunpremitaj en la fabrikejo estas disciplinataj kiel soldatoj en la kazerno. La proletaro laboranta pasis tra diversaj ŝtupoj de l'evoluo. Komence batalas apartaj laboristoj, poste kuniĝas laboristoj de unu fabriko, de unu branĉo, kontraŭ izola mastro aŭ kompanio. Sed iom post-iom dank'al propagando de kleraj gvidantoj la laboristoj formas federaciojn de la tuta branĉo, kaj de la tuta lando. Ankoraŭ pli larĝe evoluas la organizo, kiam diversnaciaj federacioj unuiĝas por defendi siajn komunajn interesojn. La unua Internacio, "Internacia Asocio de Laboristoj" fondiĝis en Londono 1864, okaze de la ribelo en Rusa Polujo. En la komitaton estis elektitaj interalie *Bakunin kaj Marx;* ĝi komencis organizi strikojn, kaj monhelpi al strikantoj el internacia kaso. Ĝi pereis kun la Pariza Komuno 1871. La Dua Internacio kongresis unuafoje en Parizo 1889. Dum sia 25-jara ekzistado ĝi faris grandan organizan laboron, starigis tutmondan kutimon de la festo de 1a majo, disvolvis kontraŭmilitan propagandon, igis socialistajn parlamentanojn voĉdoni kontraŭ la militaj buĝetoj. Lastfoje ĝi kongresis en Bern 1919, sed samtempe fondiĝis Tria Internacio per la du konferencoj en Svislando: ZIMMERWALD kaj KINTHAL. En Moskvo 1919 okazis unua kongreso de la Tria Internacio, nomata Komunista. Depost tio ĝi kongresas ĉiujare, kaj bazas sin sur la potenco de Soveta Unuiĝo. La komunista Internacio, mallonge "Kominterno", entenas komunistajn partiojn: rusan kun 330 000 anoj, germanan kun 250 000, francan kun 80 000 britan kun 6000, italan kun 25 000, ĉeĥoslovakan kun 170 000, bulgaran kun 40 000, jugoslavan

kun 85 000, aŭstrian kun 16 000, svisan kun 6000, svedan kun 13 000, norvegan kun 60 000, finnan kun 25 000, polan kun 10 000, usonan kun 5000, k. a. (Post 1924 tiuj nombroj iom aliiĝis).

Apud la Dua kaj Tria Internacioj, kiuj reprezentas moderitan kaj ekstreman socialismon, ekzistas "Sindikata Internacia Federacio" kun sekretariejo en Amsterdam. Ĝi entenas 18 milionojn da laboristoj, organizitaj en naciaj unuiĝoj, ekzemple germana "Allgemeiner Deutscher Gewerkschaftsbund" kun 8 milionoj da anoj, britan "The Trades Union Congress" kun 4 milionoj, francan "Confédération Générale du Travail" kun 800 000, ĉeĥoslovakan "Odborové Sdruženi" kun 400 000, aŭstrian "Gewerkschaftskommission" kun 1 miliono, ktp. (Nombroj el 1922).

Ligo de Nacioj. Malnova revo de eŭropaj ŝtatuloj-idealistoj pri "Etats Unis d'Europe" (Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo), kaj pli modernaj provoj de la internacia tribunalo, arbitra kortumo (ekz. en Hago), ricevis subitan komencon de realiĝo sub la formo de la Ligo de Nacioj (League of Nations, Société des Nations, Völkerbund, Svaz Narodů, ktp.). La Ligo naskiĝis kiel sekvo de la milito 1914—1918, kaj ĝia statuto eniris la traktaton de VERSAILLES. La statuto komencas jene: "La altaj kontraktantoj, konsiderante, ke, por faciligi la internacian kunlaboron kaj por havigi al la nacioj la pacon kaj la sendanĝerecon, estas laŭcele: promesdevige akcepti ke, en difinitaj okazoj, oni ne uzos la militon, sensekretigi kaj bazi sur justeco kaj honoro la internaciajn rilatojn, observi akuratege la interkonsentojn de internacia juro, akceptitajn de nun kiel efektiva regulo por konduto inter registaroj, estigi la justecon kaj la skrupulan obeon al ĉiuj devoj de la traktatoj en la reciprokaj rilatoj de la organizitaj popoloj . . ." Unue en Londono dum 1919, poste en Ĝenevo depost oktobro 1920, la Ligo disponas je du ĉefaj organoj: Kunveno kaj konsilantaro. La kunveno okazas ĉiujare, en aŭtuno. La konsilantaro kunsidas sesfoje en jaro. La Sekretariejo de la Ligo, kun multaj sekcioj, gvidas konstantan laboron, korespondadon kaj eldonadon. Apud la Ligo, sed sendependa, funkcias "Internacia Labor-Oficejo" ("Bureau International du Travail"). Por kompreni la realan rolon de la Ligo, necesas memori ke ĝi ne estas sendependa, alta institucio, al kiu devas obei ĉiuj regnoj, ĝiaj anoj, sed nur speco de publika areno kie aperas reprezentantoj de la regnoj, kaj granda oficejaro kie funkcias oficistoj de la koncernaj registaroj. Laŭ la ideo de la fondintoj ĝi devus esti tutmonda registaro super ĉiuj naciaj registaroj, disponanta je internacia armeo, sola garantio ke ĉiu regno obeos al la ligaj decidoj. Sen tiu materia forto la morala influo de la Ligo ne ekzistas por tiuj regnoj-membroj, kiuj agas kontraŭ la altaj principoj de la justeco, esprimitaj en la statuto. La novaj ideoj de la Ligo do restis "morta litero", ĉar ĝi estas gvidata de la malnovaj homoj, diplomatoj,

oficialaj politikistoj, kiuj specialiĝis en la "diplomatio". Nu el la reciproka malfido ne povas naskiĝi iu fidinda aŭtoritato kun reala forto. Sed post ĉio, la ekzistado mem de la Ligo, la publika atento al la internaciaj rilatoj estas treege valoraj, necesaj, por la iom-post-ioma edukado de la novaj ŝtatistoj. Kun sia jara buĝeto de 30 000 000 oraj frankoj — la Ligo de Nacioj ankoraŭ restas nur eta komenco, rudimenta embrio de la estonta "Ligo de Popoloj" pri kiu revas noblaj kaj kleraj sociologoj.

Religioj, ordenoj kaj sektoj.

(Provo de internaci-lingva nomigado kaj difino.)

Abelanoj, kristana sekto de l' 4ª jarcento en Nordafriko, kondamnis edzecan vivon.

Abisenia eklezio = etiopia eklezio. Kristana branĉo. Fondita de Frumentio kaj Edezio ĉirkaŭ 330ª jaro en nuna Abisenio. Kiel parto de l' kopta-egipta eklezio aliĝis al la monofizita konfesio kaj izoliĝis. La metropolito rezidas en Gondar. Bapto kaj cirkumcido.

Abrahamanoj. Bohema sekto de l' 18ª jarcento. Konsideris nur la 10 Devojn kaj la "Patro Nia".

Adamanoj, gnostika sekto de l' 2ª jarcento, celanta atingi paradizan senkulpecon per nudeco.

Adventistoj = protestanta sekto en Nordameriko fondita 1831 de William Miller (Milleranoj), kin predikas pri baldaŭa reveno de Mesio.

Aerianoj, adeptoj de Aërius, presbitero en Sebaste Armenio, ĉirkaŭ 360ª jaro. Kontraŭ devigo al fasto, kulto de mortintoj, episkopa privilegio.

Albertanoj = protestanta sekto, parenca al la Metodanoj fondita en Nordameriko de Jakob Albrecht, † 1808.

Albianoj = sekto de l' 13ª jarcento en *Albi* (ĉefloko de nuna franca departemento Tarn) celinta apostolan simplecon, suspektita esti kontraŭ la Roma centralismo (Albiĝenaj militoj). [France: Albigeois, germane Albigenser.]

Anglikana eklezio, la protestanta ŝtateklezio angla. Laŭ la konfeso ĝi estas identa kun la protestantismo de *Calvin.* Fondita 1534 de Hemiko VIII. — La anglo reĝo estas unue estro. Tri direktoj — High Church — Low Church — Broad Church — Fundamenta dokumentaro: Book of Common Prayer, La kredo konfeso fiksita en la "Trideknaŭ artikoloj".

Antitrinitarianoj = kontraŭ la doktrino de l' sankta triunuo. Komunecoj en Nordameriko sin nomas "Unitaranoj".

Arianoj = anoj de l' presbitero Ario † 336 en Alexandria. Ĉefa dogmo la nesameco de Dio patro kaj Kristo. Malaperis en la 5ª jarcento.

Arnoldanoj. Sekto fondita en la 12ª jarcento de *Arnold de Brescia.* Celis internan reformon de la eklezio.

Asasanoj aŭ haŝaŝanoj = ŝatantoj la haŝiŝon. Ŝiita politik-religia sekto, branĉo de la ismailanoj en Persio kaj Sirio. Ekzistis ĝis 13 jarcento.

Babanoj = sekto mahometana fondita en Ŝiras de Haĝi Ali Mohamet Ali, † 1849. Daŭrigata en la nuna bahaismo. *Bab,* araba = Pordo.

Bahaismo. Daŭrigo de l' Babismo, celanta religian fratiĝon de la homaro, forigo de l' sklaveco, de la milito k. t. p. Internacie organizita mavado. Fondinto Husejn Ali nomita Baha' u' allah. Fundamenta libro: Kitab akdas = Sankta Libro.

Baptistoj, protestanta sekto. Faranta la bapton nur ĉe plenkreskulo pentinta. Tre disvastigita en Nordameriko, Anglolando Svedio k. t. p.

Benediktanoj, O. S. B. monaka ordeno laŭ la reguloj de 1 Sankta Benedikto de Nursia. Unu el la ĉefaj ordenoj meritplena pro la disvastiĝo de kristanismo kaj civilizo en Eŭropo; kun sekcioj en ĉiuj katolikaj landoj. Centro en Romo. Virina branĉo: Benediktaninoj.

Beŝtianoj = anoj de juda sekto, fondita de Israel en Miedziboz Podolio 1750. Beŝt = mallongigo de l' vorto *Bal-Ŝem* kio signifas miraklo faranto. Sekto disvastigata en Galicio, Ruslando kaj Rumanio.

Bramanismo. Organizaĵo socia, politika kaj religia, postsekvanta vedismon, ĝin aliigante. Bramo ĉefa dio, nepersona, sinsekve enkarniĝis en Brahma, persona dio, Viŝnu kaj Siva. Ĉiu Arioblo enkarniĝo nomiĝas Ĉrimurti. Brahma havis 4 filojn el kiuj naskis la 4 hindaj heredaj kastoj: bramanoj, kŝatriaj, vajcioj kaj sudroj. Ekster kaj sub tiuj 4 kastoj estas la nepuruloj kaj parioj.

Budhismo. Fondita de Sidharta Gautama nomita ankaŭ Budha vekinto aŭ Sakija-Muni (la solulo de Sakija) 6ª jarcento a. K. Doloro estas nedisigebla de la ekzisto. Ekzisto estas produktata de la nescio, Kaŭzo de pasioj, deziroj, ŝato al la eksteraj objektoj, kiuj agante per la sentoj naskas estaĵojn; la forigo de nescio detruas la potencon de la sentoj, kaj ne plu okazas novaj noskoj. Oni atingas tion per scienco, senpekeco, almozdono, karito k. t. p. Pekulo renaskiĝas en malalta kondiĉo inter bestoj aŭ en la inferoj. Saĝulo renaskiĝas en pli bono Kondiĉo, inter la genioj, dioj, aŭ fariĝas *bodhisattva* kaj fine perfekta *budha,* senigita je la devigo renaskiĝi kaj posedanta la perfektan beatecon de la Nirvano.

Celestianoj, monaka ordeno fondita de Petro Murrhone, pli poste papo Celestono. V. 1254 laŭ la benediktena regularo.

Cionismo. Hebrea movado krei hejmon de l' judoj en Palestino. Fondita 1897 de Theodor Herzl dum la unua Cionista Kongreso en

Basel. 2. 11. 17 deklaro de ministro Belfour pri favora konsidero de la celoj. Efektivigo dank' al la Alianca venko. Reprezentanto de l' Cionisma movado estas la "Jewish Agency". Ĉiudujare kongreso. Riĉa literaturo. Cionisma jarlibro.

Cistercianoj, identa kun Bernardenoj ordeno nomita laŭ monakejo Cistercium, la nuna Citeaux apud Dijon Francujo. Bernardo de Clairvaux apartenis al tiu ordeno. Bernhardenoj: Tre meritita ordeno pro la terkulturigo de l' Nordorienta Eŭropo (Grizaj Fratoj). Virina branĉo, la cistercianinoj.

Darbistoj aŭ fratoj de Plymouth. Sekto fondita 1820 de John Darby, ekspastro anglikana. Atendas la praksiman videblan revenon de Jezuo Kristo.

Disidentoj, angle dissenters aŭ nonconformistes. Sub tiu-ĉi nomo oni komprenas en Granda Britujo ĉiujn protestantajn eklezioj̆n disiĝintaj de la ŝtata eklezio ĉefe pro konstituciaj konsideroj. Ekzemple: Presbiterionaj, Independuloj, methodanoj, baptistoj, kvakeroj. En Prusio = Dissidenten = oficiala nomo por ĉiuj malgrandaj religiaj komunumoj, ekster la ŝtate rekonitaj eklezioj.

Donatanoj, kristana sekto en Afriko de l' tria jarcento fondita de Donatus Magnus. Malaperis en la 7ª jarcento.

Duĥoboroj, laŭvorte "spiritbatalantoj", rusa popola sekto de pacifistoj, antimilitistoj, kiu migris al Kanado, pro registara persekutado.

Ebionitoj, la malriĉuloj = jud-kristana sekto ĝis la 4ª jarcento, konservinta leĝaron de Mozeo, rekonis evangelion de Mateo.

Elertanoj = germana protestanto sekto fondita de Elias Eller 1690—1750.

Eseanoj = hebrea unuiĝo religia de la 2—4ª jarcento en Palestino por sankta vivado, teno de fastoj, sabato, purecaj regulaj, kontraŭ oferado de bestoj, uzo de viando, de vino, oleo, kontraŭ ĵuro, edzeco, milito.

Evangelianoj, la anoj de la reformacio kies dogmo speciale sin bazis sur la evangelioj, diferencigante luteranan kaj protestantan eklezioj̆n.

Familia charitatis, sekto fondita de Henrik Niclaes en la 16 jarcento. Anoj en Nederlando kaj Anglolando. Malaperis en 17 jarcento.

Farizeoj, de l' hebrea vorto "perušim" t. e. izoluloj. Religi-politika partio, ekestinta en la 2ª jarcento antaŭ Jezuo Kristo. Defendantoj de la Mozea leĝo. El ili evoluis la Rabena gvidantaro.

Fetiĉismo primitiva formo de religia adorado de objektoj, kiuj simbolas diaĵon.

Filipanoj. sekto fondita de rusa monako Filipo, 17ª jarcento. Sen pastra gvidado. Disvastigita en Finlando, Litovio, Polujo, Bukovino k. a.

Framasonismo, france franc-maçonnerie, angle freemasonry, germ. Freimaurerei, laŭvorte libermasonistoj. Komuneco de libere pensantaj homoj, kunigataj en logioj. La deveno estas la mezepokaj gildoj de la masonistoj. La konstruado estas komprenata laŭ morala senco. Konstitucio 1721 verkita de Anderson. Pro politikaj kaj religiaj konsideroj ofte atakataj. Disvastigita en ĉiuj eŭropaj landoj.

Fratoj, la komunumo de la, germane Brüdergemeine aŭ Brüderunität. Protestanta sekto fondita de la "Bohemaj Fratoj" elmigrintaj Saksion (1727), Protektita de grafo Zinzendorf. Nomitaj ankaŭ "Herrnhuter" laŭ la kolonio Herrnhut en la bienoj de grafo Zinzendorf. Doktrino: La fundamenta vero estas en la harmoniiĝo de la homaro kun Dio per la sufero de Jezuo Kristo. La unuopulo spertu tiun veron per la vivanta kredo. *Organizo:* Direktata de l' Unueca Direkcio en Herrnhut. La komunumoj dividigas laŭ sekso aĝo kaj vivkondiĉoj en *korusoj.* — Oficialuloj: Episkopoj, presbiteroj, diakonoj. Branĉoj en Britlando kaj Norda Ameriko. Proksimuma nombro de anoj: 50 000 en Eŭropo; 235 misiistoj, 2000 helpantaj en koloniaj misioj kaj proksimume 100 000 konvertitaj.

Ĝajnismo, hinda moderna religio reprezentita en diversaj sektoj.

Gnostikismo = la doktrino de la rekono de l' kristanismo kiel ĉefan principon. *Gnosis* = rekono (Erkenntnis). Movado inter la hebreoj kaj Frukristanoj en Aleksandrio.

Gomaranoj = anoj de la doktrino pri la absoluta pradestino (antaŭ destina). Fondinta: Frans Gomarus (1563 Brugge—1641 Groningen).

Ĥasidoj, juda sekto, kies centro troviĝas en Volinio, Litovio, Podolio; ĝi praktikas misteraju ritojn de Talmudo kaj kabala magio.

Hesikastoj = Kvietistoj kun signifo "ripozantoj". Monaka sekto greka. 14ª jarcento, monto Athos.

Homaranismo neŭtrala tuthoma religio, proponita de Zamenhof en samnoma libreto (1906). Sur bazo de "hilelismo" tie estas projektata sennacia, tolerema diismo, frata solidareco kaj libero de kredo.

Hugenotoj el franca vorto huguenots, etimologie verŝajne sama formo kiel Eid*genosse* = Ignots. Francaj protestantoj, Longjara militado, la ok hugenotaj militoj. Edikto de Nantes 13. IV. 1598, nuligo 23. X 1685. Elmigrado protestanta — Refugiés — en Svislando, Germana Imperio, Brandeburgo, Nederlando, Anglolando, Kanado. Depost 1787 per dekreto de Louis XIV. protestantoj francaj libereco de kulto.

Humiliatoj. Laika fondaĵo 11 jarcento. Poste kongregacio presbitera. Transiris al la protestanta sekto de la Valdanoj (Waldenser, Vaudois). Ĉesigita sub Pio V., 1571.

Husanoj, frua bohema protestantismo, fondita de Jan Hus nask. 1369 en Husinec 6. VII. 1415 bruligita en Konstanz (Germanio) Rimark-

inda verkisto, protagonisto de la ĉeĥo lingvo. — Husanoj: du brancoj. 1. Kalikanoj, postulantaj ankaŭ la kalikon ĉe la komunio aŭ Utrakvistoj = sub utraque specie t. e. sub ambaŭ specoj aŭ formoj. 2. Taboranoj, laŭ la centro Tabor. Estroj en la Husana militado: Žiška kaj la du Prokop'oj . Kvar kompaktoj de Praha konfirmitaj en koncilio de Basel 1433 (Laika kaliko, nacilingva prediko, cedo de l' eklezia havo, severa moralo). 1485 paco de Hora Kutna (Kuttenberg). Bohema konfeso 1575. La Bohemaj Fratoj estas la posteuloj de la Taboritoj.

Ibaditoj aŭ Bejazitoj, mahometana sekto, devenanta Ŝaridŝitoj. Disvastigo en Oman, Zanzibaro, Alĝerio.

Ignorantoj, france Frères ignorantins, katolika ordeno kaj skolo. Fondita de Baptiste de la Salle 1680. Celo: popola klerigado.

Ikonoborcoj, rusa sekto de ikon-detruantoj, devenanta de la simila bizanca herezio.

Independentoj = Sendependuloj. Protestanta partio fariĝinta 1610 en Nederlando. 1616 en Anglolando. Oliver Cromwell ĉefo. 1620 en Nordameriko. Principoj: Sendependeco de ĉiu unuopa komuneco aŭ kongregacio. Sekve Congregationalist Church = Kongregacia eklezio: Sendependeco ĉia, kontraŭ ŝtata kaj eklezia aŭtovitatoj. Elektebla ĉiu ano por esti predikanto, diakono k. t. p.

Inigitoj = anoj de Inigo de Loyola, fondinto de la Societo Jezuo = Jezuitoj.

Islam|o = sindono al dio, nomo donita de Mahometo al sia fondaĵo. Principoj: Kredo al dia deveno de la Korano, al dia prodecido, postmorta vivo, lasta juĝo, resurekcio. Sektoj: Sunitoj, ŝiitoj, subdivididaj. Religiaj partioj: Mu'tazilitoj, reprezentantaj nacionalismon tendencon — Vahabitoj. (Vidu).

Jakobitoj. Monofizita sekto en Sirio kaj Mezopotamio laŭ la monako Jakobo Baradeo. Patriarkoj en Diarbekr kaj Mosul. Parenca al la greka eklezio.

Jansenismo, skismo kristana de l' 17a jarcento, fondita de Cornelis Jansen, 1585—1638. Pascal subtenis la idearon de l' jansenismo ĉefe akcelanta moralan seriozecon kaj fervoran piecon. Papo Klemento XI malbenis la sekton per la bullo „Unigenitus". La sekto ekzistas idee ankoraŭ en la Utrecht' a eklezio.

Jezuitoj. Anoj de la Societo Jezuo, latine Societas Jesu S. J.-Eklezia ordeno fondita 1534 de Ignatio de Loyola, komence ankaŭ nomita „Ignatianoj". Plej forta defendanto de l' Roma eklezio la ordeno energie kaj laŭplane militis kontraŭ la reformismo kaj pro severa disciplino, fervoreco kaj sistemeco atingis multan sukceson. Organizo rigida, severa elekto de l'anaro, limigo de ĝia nombro igis tiun ordenon la plej forta apogilo de l' Roma Eklezio. 1773 ĉesigita sub Papo Klemento XIV. Restarigo 1814 sub Papo Pio VII. En pluraj landoj

malpermesita, ekzemple en Svislando depost 1847. — Sido de l'ordeno estas Romo. La ĉefo estas nomata generalo. Nuna nombro de anoj inter 17—18000.

Ĵezidoj (Dŝesidoj) sekto en la Sinĉar-montaro, Mezopotamio. Restoj de idolana servo miksita kun mahometana kaj kristana instruoj. Ofte nomataj — Adorantoj de l' diablo —.

Jogi = hindaj asketoj, kinj praktikis mistikan ekstazon, spiritan renaskiĝon.

Johanitoj, eklezia ordino kavalira. Devenas de fondaĵo 11a jarcento de komercistoj el Amalfi en Jerusalemo. (Hospitalfratoj) Konstitucio de l'ordeno 1113. Ordena blazono: Blanka kruco sur ruĝa kampo, Johanita kruco. Ekzistas nuntempe kun sido en Romo. Kiel nobela ordeno protestanta en Germanio kun sama nomo; ĝi havas bonfaran karakteron similan al la Ruĝa Kruco.

Kalvinismo. Reformita eklezio fondita de Jean Calvin el Noyon, Francujo (1509—1564). Enkondukis la reformon en Genève. Lia ĉefa verko „Institutionis religionis christianae" 1536 estas la fundamento de la reformita teologio. Genève fariĝis centro; en Hungarlando ekzistas branĉo kun centro en Szeged.

Klarisaninoj, katolika ordeno de l' Sankta Klaro, fondita de Klaro Scifi 1212 en Assisi. Virina branĉo de l' Franciska ordeno. Ankaŭ nomitaj Damianinoj laŭ monakinejo Sta Damiano. Nuntempe merita instrua ordeno.

Kamaldalanoj aŭ Romualdanoj = monaka ordeno fondita 1018 de Sta Romualdo en Camaldoli. Portas blankan robon. Nomataj ankau „Blankaj Benediktanoj".

Kamizardoj = france camisards de lat. camisia = ĉemizo. Reformitaj kamparanoj en la Cevenoj.

Karmelitoj, katolika ordeno, fondita sur monto Karmel 1156. De 1247 almozula ordeno. Formas tri sendependajn korporaciajn: 1) Observantoj, aŭ K. nudpieduloj, 2) Konventualoj, 3) Tertiaranoj. Virina ordeno fondita 1452, okupas sin pri instruado.

Kartuzianoj. Katolika ordeno, fondita en Chartreuse proksime de Grenoble 1084. Loĝas individue en domoj, observas severan fastadon kaj silenton. Konataj pro sciencaj studoj kaj konstruaĵoj, bonfaro. Forpelita el Chartreuse 1903. Nuna sidejo de l'ordenestro: Farneta apud Lucca en Italio. (Fama likvoro „Grande Chartreuse" distilita en la monakejo samnoma.)

Kataranoj = la puruloj. Asketa sekto de l' 11a jarcento, en Italio, Suda Francujo, Hispanio kaj Germanio. Aliaj nomoj: Patarenanoj, Publikanoj Popelitoj. Malaperinta kun la albiganoj, en 13a jarcento per la inkvizicio sub Simon de Monfort.

Katolikismo. Greke: Kath'hólon = universala, ĝenerala. De l' 2a

jarcento nomo par la tuta kristana eklezio, do *Katolika Eklezio*. Disiĝo 1054 en Orient-Katolika aŭ Greka kaj Rom-katolika eklezioj. K. E. centre kgj firme organizita kun supera estro la Sankta Patro (papo) en Romo.

Konformistoj = anglaj protestantoj submetiĝintaj al la 39 artikloj de la Anglikana Uniformeca Akto. La rifuzintoj estas la Nekonformistoj aŭ Disentistoj.

Kopta eklezio. Etimologie verŝajne de „e g i p t", arabe kopt. Kristana monofizita eklezio en Egipto, depost 5a jarcento. Patriarko en Kairo.

Kristan-socialistoj, movado fondita de Paul Passy, kiu celas harmoniigi paceman socialismon kun klera kristanismo.

Kvakerismo. De l'angla vorto „Quaker"-tremanto, moka popola nomigo de religia komuneco fondita dum la 17a jarcento de George Fox en Anglujo. „Societo de l'Amikoj" kiel estas la vera nomo akcelis vere kristanan vivon sur la bazo de l'interna konsciiĝo dieca. Sen profesiaj pastroj, sen sakramentoj, silentemo dum kunvenoj ĝis iu el la anaro sentas la devon prediki aŭ preĝi. Kontraŭ la milito, la plezuroj, sencela komplimentado, severmora. Por la liberigo de la sklavoj, egaleco de la virinoj, vasta senmezura helpado al suferintaj kaj malsatintoj precipe infanoj dum kaj post la monda milito. Konata kvakero estis William Penn, la fondinto de l'Ŝtato Pennsilvanio kaj urbo Filadelfio.

Kvietismo (Kvietisto). Katolika mistika komuneco fond. de Molions, disvastigita en Francujo, 17a jarcento.

Lamaismo, tibeta formo de la budismo, fondita de Cong-Kapa 14 jarcento. Hierarkia organizo kun du superuloj, la *Dalaj-Lama* en Lhasa kaj la Panĉen Rinpoĉe-Lama en Taŝilunpo, apud Ŝigace. La dogmaro de l' lamaismo troviĝas en la *Kanĉur* kaj *Tanĉur*, kolektoj de religiaj meditaĵoj. Kredoformulo: Om mani padme hum', nur en lotuso estas Vero. —

Laotseanoj adeptoj de ĉina doktrino de Lao Tse, de hinda deveno.

Lazaranoj, kongregacio fondita 1624 de Vincenco de Paul. Interna kaj idolana misio.

Levellanoj = egaluloj. Religia-politika sekto kun tendenco komunisma, fondiĝinta en la armeo de Oliver Cromwell.

Lipovanoj, rusa sekto de primitiva kristanismo (maloficiala), tre disvastigita en Suda Rusujo, Besarabio, Moldavio, Dobruĝo, Bukovino.

Luteranoj, anoj de la protestanta eklezio fondita de Martin Luther (1483—1546 en Eisleben). Ĝenerale oni komprenas sub tiu nomo ĉiujn evangeliajn komunumojn kiuj vivas laŭ la instruo de Luther, ĉefe en germanaj kaj skandinavaj landoj, ankaŭ en Usono. Proksimume $^1/_3$ de la protestantaj estas luteranoj. (Luther tradukis la biblion en la germanan lingvon, formante ĝin kiel literaturan lingvon. Multflanka

verkisto. Reformaciaj verkaj: Al la kristana nobelaro de „germana nacio", La babilona kaptiteco de l'eklezio: Pri la libereco de l' kristana homo.

Malnov-Katolikoj = katolikoj de antikva rito. Fondita 1870 en Germanio sekve nerekono de decidoj de la Vatikana koncilo samjara: eklezia ĉiopoveco kaj la neerarebleco de l' Papo en ekleziaj aferoj. Ĉefe disvastigata en germanlingvaj landoj. Parencaj eklezioj en sudaj landoj kaj Nordameriko. — Edziĝrajto de la pastroj: sinodoj, ĉiujara kongreso internacia. (Germana nomo: Deutschkatholiken aŭ Altkatholiken; France Vieux Catholiques, aŭ Catholiques Liberaux.

Marianaj kongregacioj. Katolikaj unuiĝoj laikaj aperintaj en la 16a jarcento kaj fonditaj plejmulte laŭ instigo da la jezuitoj. Flego de pieco, spiritaj ekzercoj kaj kunvenoj.

Manismo manihеismo, (manismanoj). Orientala religio fondita 242 de Mani. Bazita sur antikvaj persaj doktrinoj kaj kristana gnostikismo. La principoj de Bono kaj Malbono estas prezentitaj per la instruo ke de la komenco estis regno de lumo kontraŭ la regno de l' malluмo. — Jezuo Kristo savis la mondon sed liaj disciploj ne sekvis lin. Por tio Mani aperis kiel helpanto aŭ konsolanto (parakleto). La instruo disvastiĝis en Persio, Norda Afriko, Italio. Subpremita ĝi retiriĝis en Orienta Azio kie ĝi serpens sub div. formoj. (Ne plu ekzistas nun.)

Mariavitismo (Maria Vita) Maria Vivo. Fondita en Pollando antaŭ lo milito, tre populara. Maria kulto, sociaj reformoj. Centro en Płock, Pol.

Maronitoj, anoj de malgranda kristana sekto en Libano, unuigita kun la Rom-katolika eklezio. Eklezia lingvo la siria. Centro: Monakejo de l' sankta Maro. Patriarko.

Mazdeiszmo. Oni ĝenerale konsentas ke mazdeismo naskis inter la medoj, kaj disvastiĝis kun ili en Persio. Nun, mazdeismo estas ankoraŭ la religio de la Gebroj (Persio) kaj Parsoj (Indio). Du principoj daŭre, interbatalas, tiu de la vivo kaj feliĉo, kaj tiu de malfeliĉo kaj malbonsorto. La unua estas personigita de Ahura-Mazdâ (Ormuzd), la dua en Angro Mainius (Ahriman). La Auta mazdeisma instruo povas esti mallongigita en tiu ĉi formulo: „Bonaj pensoj, bonaj paroloj, bonaj agoj". La sankta libro de la mazdeistoj estas la Zend-Avesta.

Melhitoj. (Meleh, Melek = reĝo). Nomo de ortodoksaj kristanoj obeintaj la reĝon aŭ estron, en la landoj konkeritaj de la araboj.

Metempsikozo antikva kredo je migrado de animo de unu korpo al alia, de besto al homo, de homo al besto, planto, ktp.

Misio Interna, klopodado por vivigi kristanan senton kaj savo el spirita kaj materiala mizeroj. Fondo de aziloj, flegado, unuiĝoj junulaj-junulinaj. Ĉefe en Germanio. Protestanta.

Modernismo. Teoria direkto en katolika teologio, precipe en okci-

dentaj landoj, devenigata de influo de l' modernaj sciencaj. 1907 kaj 1910 malaprobita de Papo Pio X. De 1910 speciala juro de katolika pastraro malaprobanta tiun sistemon. (Modernisma juro.) —

Monarkianoj estis kristanoj el 3a jarcento malakceptintaj la instruon de l' Triunuo, restintaj ic la Unupersoneco de Dio (Monarchia).

Monismo, la instruo de l' Unueco; kiu devenigo de ĉiuj aperaĵoj je unu principo. Akcelas ordigi la viron de l'individuo kiel de la kolektivo sur fundamento de sciencaj esploroj. Sendogma, nereligia mondpercepto, tre disvastigita en germanlingvaj landoj.

Montanusanoj, anoj de Montanus; malgranda kristana sekto en Frigio dum la 2 jarcento.

Mormonoj, la sanktuloj de l' lasta tago. (Latter Day Saints). Sekto en Usono fondita de Joseph Smith 1830 laŭ verko de supozata profeto Mormon. Sub gvido de Brigham Young fondis la Mormonŝtaton Utah kun la ĉefurbo Nova Jerusalemo aŭ laŭ nuna nomo Salt Lake City. — Frukristanaj kaj bibliaj ideoj miksitaj kun modernaj. Poligamio, post 1896 leĝe malpermesata. Ĉirkaŭ 500 000 anoj. Vasta propagando en Eŭropo, precipo en Germanio kaj nordaj landoj.

Nazarenoj. Nomo de la unuaj kristanoj; pli poste nomo por kristanigitaj judoj. Nuntempe nomo de diversaj malgrandaj sektoj. (Nazarenoj = anoj de (Jezuo) el Nazareth. En Serbio — pacifista kontraŭmilita sekto.

Nestorianoj = anoj de Nestorius, monako vivinta en Sirio, fariĝinta patriarko de Konstantinoplo 428. Sekto disvastigita en Sirio; parto aliĝis 1898 al la ortodoksa eklezio, dume alia unuiĝis kun Romo. Ĉefa dogmo: Du naturoj en Jezuo Kristo, la dieca kaj la homa. —

Nigra meso, nokta sekreta adorado de Satano, ĉe modernaj malkristanaj sektoj.

Odd Fellows (Independent Order of . . .). Tre disvastigita societo simila je Framasona. Fondita 1760 en London. Nun okupiĝas pri morala, eduka kaj bonfara agado.

Oratorianoj, pastra frataro sen monaka devigo. Filipanoj en Italio laŭ fondinto Filipo de Neri 1558.

Orfanoj = la orfoj, nomiĝis husana partio disiĝinta sed poste rekuniĝinta kun la taboranoj.

Pakanarianoj. Laŭ regularo de Societo Jezuo fondita ordeno post ĉesigo de la S. J. Fondinto Nikolo Paccanari en Spoleto 1799.

Palotianoj. Fondinto Vicenzo Pallotti (1795—1850). Societo de la katolika apostoleco kaj de la misioj „Pia Societas Missionem".

Pantenteismo, instruo laŭ kiu la universo estas en kaj samtempe ĉirkaŭata de Dio. [Malebranche, 1638—1715, „De la recherche de la verité].

Panislamismo, nomo por la movado celanta la kunigon de ĉiuj mahometanoj, ne nur politike sed ankaŭ religie ekz. la reunuigo de sunitoj kaj ŝiitoj. [Pan' = tut', Tutislamismo].

Panteismo, instruo laŭ kiu Dio kaj Universo formas unuon. [Spinoza, Giordano Bruno]. Panteisto = ano de l' panteismo.

Parsoj, anoj de l'instruo de Zoroastro, en orienta Hindio, devenantaj de antikvaj persoj nomataj ankaŭ adorantoj de l' fajro, verŝajne identaj kun la sekto de la ĵezidoj.

Patarianoj de l'itala vorto Pataria, urba kvartalo de Milano. Nomo de la anoj de l' kluniazena reformo dum 11a jarcento. (Katarianoj kaj bogomiloj].

Paŭlianoj, grek-dualisma sekto fondita en Armenio ĉ. 650. Apostola simpleco ĉefa klopodado. Kristianigitaj 1115 de Alexios Komnenos.

Pelagianoj, estas la adeptoj de brita monako Pelagio mortinta en 5a jarcento. Ĉefa instruo: La natura forto de l' homo sufiĉas por akiri la benitecon. La Pelagianismo estis malaprobita 431, sed aperis dum 6a jarcento en Galio.

Piaristoj, lat. Patres Piarum Scholarum, ordeno fondita 1597 de l' hispano Calasanza. Promeso de l' devigo al senkompensa instruado de l' junularo. Speciale aganta en Ameriko, Aŭstrio, Hispanujo kaj Italujo.

Pietismo. Sub tiu-ĉi nomo oni komprenas klopodadon en la protestanta eklezio akcelanta piecon internan kaj bonfaran kristanecon. Centro de l' P. en germanaj landoj estis Halle, kie vivis A. H. Francke fama pedagogo. Pietisto, ano de l' pietismo, esprimo ofte uzata en senco de piecŝajniganta homo.

Pitagorismo hellena doktrino de hinda deveno (Pytha-goras = Budhaguru), kiu predikis migradon de animoj, vegetarismon, religian ekstazon, misteron de nombroj.

Politeismo de l' greka Polytheismus = multdieco, la kontraŭo de l' monoteismo, la unudieco. La politeismo estas evoluo al personigo de l' kredo al naturaj provaj fenomenaj ekz. tertremaj, postmorta agado de homoj.

Presbiterismo [presbiterano]. Anoj de la presbitera eklezia konstitucio precipe en anglalingvaj landoj. Presbitera Monda Alianco de 1877 entenas ankaŭ francajn kaj svisajn reformitajn eklezioj̆n.

Protestantismo (protestanto) kolektiva nomo por la kristanaj eklezioj eliĝintaj el la katolikismo. La nomo devenas el la protesto de la evangelia partio en Speyer 1529 ĉe la Imperia kunveno kontraŭ la decido de l' plimulto ne konsideri la ekleziaĵn reformojn. La P. ne estas specife organizita, en Svislando oni uzas la nomon Reformita eklezio, (reformitaj) en germanaj landaj — evangelianaj.

Puritanismo (puritano). Angla reformita eklezio, celanta starigi la eklezion en evangelia pureco [puritas]. Pluraj subgrupoj: Independantoj, presbiteranoj, baptistoj k. a. En la angla revolucio gvidata de Oliver Cromwell. Puritanoj la pilgrimpatraj fondis la Novanglajn ŝtatojn

en Norda Ameriko kaj tiel metis la Fundamenton je la giganta angla lingva kaj ĉefe protestanta Usono de l' nuna tempo.

Raskolnikoj, estas rusaj skismanoj el la grekortodoksa eklezio. La skismo okazis dum 17ª jarcento pro ŝanĝo en la liturgio kaj rito faritaj de patriarko Nikon. [Raskol, rusa vorto = skismo apartiĝo.]

Redemtoranoj [lat. redemptor]. Katolika ordeno C. Ss. R. Fond. de Alfonso de Liguori [Liguorianoj] parenca al Societo Jezuo. Aktiva en la interna misio.

Reformita eklezio, estas nomata la reformoj de Zwingli kaj Calvin en Zürich kaj Genéve. La diferencoj inter la luterana kaj reformita eklezioj koncernas la komunion [Luther: reala ĉeesto de korpo kaj sango de Jezuo kristo; Zwingli: Simbola; Calvin: Spirita.] Diferencoj en la konstitucio. — Multaj apartigoj kaj sektoj. Disvastigo: En Germanujo, Francujo. Svislando, Usono, Skotlando, Hungarujo. [Kalvinanoj, Hugenotoj.

Religia Socialismo (vidu Socialismo religia).

Socialismo Religia, estas protestanta komuneco, disvastigata en Svislando, sub influo de ideoj de Tolstoj. Konsideras kapitalismon, militon kiel kontraŭkristana.

Sabatanoj, kristanaj sektoj. Konsideras la malnovtestamentan sabaton devigan ankaŭ por kristanoj. Ripoztago do estu la sabato kaj ne la dimanĉo.

Saduceo de l' hebrea vorto „zedukim". Aristokrata partio juda, kontraŭa al la farizeoj. Konsideris nur la Mozean leĝaron ne rekonis la kredon je resurekcio kaj anĝeloj.

Salesanoj. religia ordeno nomita laŭ Francisko de Sales. Fondita de l' presbitero Don Bosco [1815—1885 Torino]. La ordeno formiĝas el presbiteroj kaj laikoj. Lerneja kaj sociala klopodado. Disvastigata en Italio kaj Suda Ameriko. Virina branĉo: Salesianinoj.

Salvatoranoj = Societo de l' Dia Savanto, latine Societate divini Salvatoris (SDS). Katolika ordeno. Fondita 1881 de Francisko M. Jordan. Centro: Romo. Interna misio, instruado, ekstera misio. Virina branĉo 1888; instruado, flegado de malsanuloj.

Ŝamanismo. Religio de popoloj de Orienta Siberio kaj Nordo de Azio. Ĝi havas kiel bazon Kulto de la naturo kaj de la spiritoj kiuj ĝin estras. La pastroj nomitaj ŝamanoj estas konsiderataj kiel sorĉistoj.

Samaritanoj = la loĝantoj de Samaria, parto kaj urbo en antikva Palestino. Propra religia komunumo, rekonanta nur la 5 librojn de Mozeo. Resto ankoraŭ nun ekzistanta en Nablus. Samaritano, ĝenerala nomo por flegisto de malsanuloj, devenas de l' biblia rakonto de l' kompatema samaritano.

Sav-armeo [Angle Salvation Army, france Armée du Salut, germane Heilsarmee]. Milite organizita religia komuneco, protestanta. Fondinto William Booth. Nuna estro: Generalo Bramwell Booth. Centro London. Gazeto: „La krio de l' milito" en angla franca germana lingvoj. [The War Cry, Cri de guerre, Der Kriegsruf].

Scientismo, protestanta sekto „Christian Science" do Kristana Scienco.

Senusoj estas mahometana ordeno, fondita de Mohamed-Ibn-Ali-es-Senussi 1833. Centro: Oazo Ĵarabub en Libio. Kontraŭ eŭropanoj kaj kristanoj.

Servitanoj = Servantoj de l' Sankta Virgino. Katolika ordeno fondita 1233 en Florentia (Firenze). [Branĉo: Servitaninoj aŭ Nigraj fratinoj].

Ŝia, ĉefa sekto Islama, disvastigata speciale en Persio. Defendas la instruon ke nur Ali, la nevo de l' profeto estas laŭleĝa kalifo. Sanktejo en Kerbela, urbo en Mezopotamio kie estis martirigitaj Husseian kaj Hassein. — La Ŝia disfalis en subsektoj ekz.. Zeiditaj Ismaelitaj, Imamitaj.

Sikoj, hinda religia komuneco. Fondita de Nanak [1469—1538]. Celo: Unuigo de hinduismo kun Islamo, per simpligita religio kaj severa moralo. Fondo de propra ŝtato en la Pendĵabo [Lando de l' kvin riveroj]. De 1849 ligita al la hindobrita imperio.

Sinkretismo, la klopodo kunigi diversajn religiojn partiojn aŭ sistemojn. En la filozofio ekzistis skolo dum 16ª jarcento, volinta kunigi doktrinojn de Aristotelo kaj Plato.

Sinodo. [Koncilo, kunveno eklezia]. Supera aŭtoritato de l' ortodoksa eklezio, starigita 1721 de l' Petro la Granda kaj konsistanta el episkopoj kaj Supera prokuratoro; estro estis la caro.

Ŝintoismo. — Nacia religio japana. Ŝintoismo estas la plej malnova japana religio. Deino Omaterasu, personiĝo de la suno, estris la ŝintoistan diaron en kiu estas pluraj personigoj de naturaj fortoj. En 1868 per religia reformo ŝintoismo ricevis ŝajnon unudiecan, sed la popolo ne tion akceptis. Ŝintoismo honoras la prapatrojn. Ĝia estro estas la imperiestro de Japanio. En la temploj estas neniu dia bildo.

Siriaj kristanoj, kolektiva nomo por orientaj kristanoj precipe en Malgrand-Azio, kaj kiuj uzas la sirian lingvon kiel kultidiomon. Pli speciale oni komprenas ankaŭ la nestorianojn. en Kurdistano kaj ĉe Urmia lago. [Maronitoj, Jakobitoj, Tomasanoj.]

Siria eklezio, grava parto de l' ĝenerala eklezio kristana dum la unuaj jarcentoj. Centro Antiochia, depost la jaro 325 sidejo de l' patriarko. Nun ligata al la Romkatolika eklezio. Apartigoj estas: Nestorianoj, Jakobitoj, Maronitoj, Melhitoj.

Skopcoj, orientslava sekto, ĉiam prospera malgraŭ jarcentaj persekutoj de registaroj, spite je suferigaj iniciataj ritoj (kirurgia forigo de

mamoj, virorganoj). Ekstere kristana, tiu sekto devenas el iranaj skitoj, kiuj antaŭ Kristo loĝis inter Danubo kaj Dono; samepokaj amazonoj (a-mazos = «sen-mama») apartenis al praa skopca rito.

Spiritismo. Sub. S. oni komprenas la instruon pri la ebleco rilati kun la mortintoj. Fruaj propagandistoj de l' S. estis Swedenborg kaj Mesmer.

Ŝtundismo, adapto de luteranismo al sudrusa popolo, en formo de senrita, libera evangeliado.

Stundistoj de la germana „Stundisten" [Stunde = horo] idee = anoj de l' horo de preĝado aŭ edifo. Pietista-evangelia sekto en iama Ruslando, speciale en la suda parto.

Sufismo. Interislama movado mistik-teozofia. Komenco jam ĉ. 8ª jarcento kaj disvastigata ĉefe per la dervišordenoj. Posedas vastan literaturon kaj anaron en neislamoj landoj.

Sunna [Sunnitoj] ortodoksa tradicio de l' Islamo. La cefaj landoj kie la Sunna estas disvastigita estos Arabio, Turkujo, Egipto. — Kaŭzo de la apartiĝo estas la sekvo en la kalifato post Mahometo. S. konsideras Abu Bekr, la bopatron de l' profeto kiel rajtigitan sekvinton.

Taboranoj = anoj de Jan Hus la ĉeĥa reformatoro [Husanismo] laŭ la defenda centro Tabor en Bohemio, fortikaĵo starigita de Žiška 1420.

Teismo, signifas ĝenerale la kredo en Dio, pli speciale la kredon de persona dio, reganta la universon.

Templanoj, eklezia ordeno kavalira fondita 1118 de frankaj nobeluloj. Tri devoj: Monaka asketismo, luktado kontraŭ la senkreduloj, protektado de l' Sankta Tombo. 1312 ĉesigita.

Templa Societo, religia komuneco protestanta fondita 1854 de Christian Hoffmann en Germanio. Kolonioj en Ĥaifa, Jaffa, Saron en Palestino. Aliaj nomoj: Germana Templo, Amikoj de Jeruzalemo, Hoffmanianoj.

Teozofio = Dia Saĝeco, la ekkono de Dio kaj de Dia agado. Teozofiaj societoj elirantaj de Ameriko kaj Hindujo ekzistas ĉie. Eniro de hindaj doktrinoj. Kunligiĝo kun vivreformaj movadoj speciale vegetarismo. Antropozofio estas nova formo.

Tertianoj [Tercianoj] Tertius ordo de poenitentia. Pentofratoj aŭ pentuloj. Laikaj aliĝantaj al ordeno sen la ĉefa promeso kaj ne forlasantaj la ĝisnunan okupon sed plenumantaj regulojn de pentafaro kaj asketismo.

Trapistoj, ordeno katolika fondita 1663 de Abato Rancé en *La Trappe*, dep. Orne Francujo. Severega regularo asketa, kamplaborado, vegetara vivado, malpermeso paroli. Pro la severeco tre malmulte disvastigata. Ĉ. 60 monakejoj. Multmeritata pro kulturigo de l' tero. Virina branĉo depost 1797 dediĉanta sin al eduko de Filinoj.

Trinitarianoj = Anoj de l' ordeno de l' Sankta Triunueco. O. S. S. T. Fondita 12ª jarcento kun la celo liberigi kristanojn el sklaveco islama.

Unitarianoj, angle Unitarians = protestanta komuneco malakceptanta la doktrinon de l' Triunueco. Ĉefe disvastigata en Anglolando kaj Usono.

Universalistoj, usona religia komuneco instruanta la universalecon de l' graco.

Ursulaninoj, virina ordeno katolika, fondita 1535 en Brescia de l' Sankta Angela Merici al la memoro de l' Sankta Ursula. Tre disvastigata ordeno sin okupanta pri instruado de filinoj kaj pri flegado de malsanuloj.

Vaĥabitoj, religia movado islama komenciĝinta en centra Arabio (Nedĵd) en la 18ª jarcento sub gvido de Mohamet-ibn-Abd el Vaĥab. Celo, rekonduki Islamon al la origina pureco kaj simpleco. La evoluo kondukis al politikoj malpacoj. Subpremita de l' sultano la V. restis kiel sendependa komuneco en centra Arabio ĝis nunaj tagoj. Ĉefloko: E. Riad. Ĉefo: Emir Ibn Saud.

Valdanoj, reformema sekto fondita dum 12ª jarcento de Petro Valdus en Lyon celanta revenon al apostola simpleco kaj predikadon de l' evangelio. Ankaŭ nomitaj "Pauperes de Lugduno" t. e. la malriĉuloj de Lyon. Malpermesita 1184. Ligitaj en Italio kun la humiliatoj, en Bohemio kun la husanoj kaj Bohemaj Fratoj. Limigitaj en la alpvaloj de Piedmonto (Piemonte). Aliĝis al la kalvinismo. Rekonita de 1849 (Franca nomo Vaudois, germana Waldenser).

Veda religio, hinda praa religio politeisma plej antikva (Rigveda). Kvar klasoj de dioj: 1. personigo de naturaj fortoj, 2. Adityas, 3. Devas, 4. patrodioj. (Dyaus. = ĉielodio, Uŝas = la diino de l' Aŭroro, Surya = Sundio, Vajus = Dio de l' Vento; Nacia Dio estas Indra.)

Vedismo. La Eŭropanoj nomas tiel la unuan formon de la Hinda religio. Religio personiganta la naturajn fortojn. Ĉefaj dioj: *Agni* (fajro), *Indra* (atmosfero kaj ĝiaj fenomenoj), Soma (digita verŝofero). Ĉiuj dioj estas nomataj deva (briluloj). La diabloj nomiĝas asura.

Zoroastrismo. Doktrino de Zoroastro aŭ pli bone Zaratustra, al kiu la klasikaj verkistoj atribuas la fondon de mazdeismo. Oni ne scias ĉu Zoroastro estis reala persono aŭ ĉu lia nomo estis tute simple tiu de mita estaĵo. Laŭ Aristoto li estus vivinta ĉ. la VIIª jarcento a. k. kaj estus ricevinta de la granda dio Ahura-Mazda (Ormazd) la tekston de l' Avesta.

Zwinglianoj, la anoj de Zwingli (kunfondinto de la reformita eklezio). Ulrich Z. 1484—1531, svisa reformatoro. Ĉefa verko [latine] komentario pri vera k. falsa religio. Vasta literaturo, revuo „Zwingliana".

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

SPACO POR NOTOJ

DUA PARTO

ESPERANTISMO


Notindaj datoj. Kongresoj.
Kiel farigis nia movado.

Organizo de la Esperanto-Movado
Institucioj, Gazetoj, Fakaj unuigoj
Listo laŭlanda de lokoj kun Delegitoj
de UEA

STATO JE LA 15 JANUARO 1928

La Espero

Himno esperantista



Notindaj datoj el la historio de Esperanto kaj de UEA.

1859. ZAMENHOF, LAZARO LUDOVIKO, naskiĝas en Bialystok (15. Decembro).
1878. ZAMENHOF festas kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la "Lingvo Universala".
1887. Apero de la broŝuro "Dro Esperanto, Lingvo Internacia".
1889. Apero de la unua gazeto en E.: "La Esperantisto" en Nürnberg
1892. Fondo de Societo "Espero" en Peterburgo (Leningrad).
1898. Fondo de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto.
1899. La raporto "La lingvo Internacia" de E. NAVILLE estas prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.
1901. Generalo SEBERT kaj CH. MÉRAY prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.
1903. Fondo de "Juna Esperantisto" de H. HODLER kaj EDM. PRIVAT.
1903. Fondo de la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto. Fondo de la Brita Esperantista Asocio.
1905. Unua kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer. Akcepto de la deklaro pri Esperantismo. Elekto de la Lingva Komitato. (L. K.)
1906. Fondo de la Germana Esperanto Societo en Braunschweig. Dua kongreso de Esperanto en Genève. Aprobo de la propono de A. CARLES pri kreo de "konsuloj".
1907. Esperanto, gazeto de UEA reaperas sub gvidado de H. HODLER. TH. ROUSSEAU instigas la kreon de Esperanto-Oficejoj. Tria kongreso de Esperanto en Cambridge.
1908. Oficiala fondo de UEA (Majo); provizora elekto de Delegitoj. Kvara kongreso de Esperanto en Dresden. Unua kunsido de UEA dum la kvara kongreso.
1909. Kvina kongreso de Esperanto en Barcelona. Dua kunsido de UEA dum la kvina kongreso.
1910. Unua kongreso de UEA en Augsburg. Sesa kongreso de Esperanto en Washington.
1911. Sepa kongreso de Esperanto en Antwerpen (Anvers). Dua kongreso de UEA.
1912. Oka kongreso de Esperanto en Kraków. Tria kongreso de UEA en Kraków. Financa reformo de UEA.
1913. Naŭa kongreso de Esperanto kaj Kvara de UEA en Bern.

1914. Deka kongreso de Esperanto kaj Kvina de UEA en Paris.
1915. Dekunua kongreso de Esperanto en San Francisco.
1916. Morto de HAROLD BOLINGBROKE MUDIE, prezidanto de UEA (6. Jan.).
Morto de TH. ROUSSEAU, vicprezidanto de UEA (11. Aprilo).
1917. Morto de Dro L. L. ZAMENHOF en Warszawa (14. Aprilo).
Morto de Rektoro BOIRAC, prez. de la Esp. Akademio (20. Decembro).
1920. Morto de HECTOR HODLER, prezidanto de UEA (30. Marto).
Dekdua kongreso de Esperanto kaj Sesa de UEA en Hago.
1921. Rezolucio de la Xa Internacia konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève,
Dektria kongreso de Esperanto kaj Sepa de UEA en Praha.
Rezolucio subtenita de 13 ŝtatoj ĉe la dua kunveno de la Ligo de Nacioj, favore de instruado de Esperanto en la lernejoj.
1922. Pedagogia konferenco pri Esperanto en Genève.
Dekkvara kongreso de Esperanto kaj Oka de UEA en Helsinki.
Decido de l'kongreso pri Oficiala Organizo Esperantista.
Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj; raporto de la sekretariaro de la L. d. N. al la tria kunveno.
1923. Komerca kaj turisma konferenco pri Esperanto en Venezia.
XVa kongreso de Esperanto en Nürnberg, UEA oficiala organizaĵo esperantista. — Morto de Dro A. MYBS, honora membro de UEA, hon. prez. de GEA kaj akademiano. — Morto de kolonelo POLLEN, honora prezidanto de BEA. — Morto de Prelato A. GIESSWEIN, prez. de Hungar. Esp. Societo.
1924. Rekomendo de la Ligo de Nacioj al la ŝtatmembroj trakti Esperanton kiel klaran lingvon en telegrafado.
XVIa kongreso en Vieno. — Memortabulo ĉe Hotelo Hammerand.
Morto de Sino Klara Zamenhof, vidvino de la majstro (7. Decembro).
1925. XVIIa kongreso de Esperanto kaj somera Universitato en Genève.
Esperanto klara lingvo en telegrafado.
Rezolucioj ĉe Paca kongreso en Paris; kongreso de Teknika Gazetaro, Trade Unions. Poŝtmarko kun teksto en Esperanto.
1926. Konferenco en Locarno. Inaŭguro de Zamenhofa Monumento.
XVIIIa kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Edinburgh.
1927. Konferenco en Praha pri "Paco per Lernejo". XIXa kongreso kaj Somera Universitato en Danzig. 40 jara jubileo.
Katedro de E ĉe la Ĝeneva Universitato.
1928. Dudekjara jubileo de la fondo de UEA, 28 Aprilo 1908. XXa kongreso de E en Antwerpen, 3—11 Aŭgusto, kaj Somera Universitato.

La Esperanto-Kongresoj.

*** Unua Internacia Renkonto en Calais—Dover.
1904, 7.—8. VIII. Prezidis kapitano CAPÉ-MONTROSIER.
180 anoj el 6 landoj. Rezolucioj: Unua kongreso en Boulogne, ĉiu jaraj kongresoj, esperantista signo, elparolo.

I. Unua Kongreso en Bulonjo (Boulogne-sur-Mer).
1905, 7.—12. VIII. Prezidis Dro ZAMENHOF kaj BOIRAC.
688 anoj el 20 landoj. Rezolucioj: Deklaracio pri Esperantismo, Fundamento, Lingva Komitato (95 anoj de 19 lingvoj), Esperantista flago, propono de A. Carles pri "konsulejoj" (embrio de UEA). Parolado de Zamenhof pri historia graveco de la unua kongreso.

II. Dua Kongreso en Ĝenevo (Genève).
1906, 28. VIII. — 1. IX. Prezidis FRIEDRICH SCHNEEBERGER.
1200 anoj el 30 landoj. Rezolucioj: Aprobo de la kreo de "konsuloj", Konstanta Kongresa Komitato, Neŭtraleco de la kongresoj. Fakaj kunsidoj unuafoje organizitaj. Parolado de Zamenhof pri la interna frateca ideo. — Fondo de Internacia Scienca Asocio Esperantista.

III. Tria Kongreso en Kembriĝo (Cambridge).
1907, 12.—17. VIII. Prezidis KOLONELO POLLEN.
1317 anoj el 35 landoj. Rezolucioj: Spesmila sistemo (help-mono) Regno (Belgio) unuafoje reprezentita. Parolado de Zamenhof pri la spirito de la kongresoj.

IV. Kvara Kongreso en Dresdeno (Dresden).
1908, 17.—22. VIII. Prezidis Dro MYBS.
1500 anoj el 40 landoj. 7 reprezentantoj de registaroj kaj oficialaj institucioj. Rezolucioj: Internacia Instituto de Esperanto. Evolua sistemo. Parolado de Zamenhof pri la unua periodo de Esperanto kaj pri la reformoj. Unua kunveno de UEA.

V. Kvina Kongreso en Barcelono (Barcelona).
1909, 6.—11. IX. Prezidis F. PUJULA Y VALLÈS.
1300 anoj el 32 landoj. 19 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Internacia Organizo de Naciaj Societoj. Parolado de Zamenhof pri la malfacilaĵoj de la laboro.

VI. Sesa Kongreso en Vaŝingtono (Washington).
1910, 15.—20. VIII. Prezidis J. BARRETT.
357 anoj el 20 landoj. 16 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Internacia Konsilantaro akceptita. Parolado de Zamenhof pri evoluo kaj estonteco de Esperanto.

VII. Sepa Kongreso en Antverpeno (Anvers).
1911, 20.—27. VIII. Prezidis A. VAN DER BIEST.
1800 anoj el 42 landoj. 26 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Rajtigitaj delegitoj. Parolado de Zamenhof pri la neceso organiziĝi.

VIII. Oka Kongreso en Krakovo (Kraków).
1912, 11.—18. VIII. Prezidis Dro MIKOLAJSKI.
1000 anoj el 28 landoj. 11 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kongresa Regularo. Lasta Kongresa parolado de Zamenhof pri la konkordo. 25a jubileo de Esperanto.

IX. Naŭa Kongreso en Berno (Bern).
1913, 24.—31. VIII. Prezidis JAKOB SCHMID.
1203 anoj el 30 landoj. 16 oficialaj reprezentantoj. Malferma parolado de R. de Saussure pri la principoj de la organizo esperantista. Rezolucioj: Fido al la Lingva Komitato, kunakordiĝo de la oficialaj organizaĵoj. Neceso de la nacia kunagado.

X. Deka Kongreso en Parizo (Paris).
1914, 2. VIII. Ne okazis pro la militdeklaro. Aliĝis 3739 anoj el 50 landoj.

XI. Dekunua Kongreso en San-Francisko (San Francisco).
1915, 22.—29. VIII. Prezidis R. COLQUHOUN.
163 anoj el 16 landoj. 17 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Propagando en Universitatoj, danko al Sro D. Parrish kaj Kalifornia esperantistaro.

*** Postmilita Konferenco en Parizo (Paris).
1919, 21.—25. IX. Prezidis ROLLET DE L'ISLE.
26 anoj el 3 landoj. Rezolucioj: Denova aranĝado de la ĉiujaraj kongresoj. Rajtigitaj delegitoj.

XII. Dekdua Kongreso en Hago ('s-Gravenhage).
1920, 9.—15. VIII. Prezidis J. R. ISBRÜCKER.
408 anoj el 27 landoj. 7 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Neceso de laboro por teknikaj vortaroj. Parolado de Dro PRIVAT pri la internacia solidareco.

XIII. Dektria Kongreso en Praha.
1921, 31. VII. — 6. VIII. Prezidis S. KAMARYT.
2561 anoj el 35 landoj. 30 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Neceso de la centra organizo. Parolado de Dro PRIVAT pri la nacia kaj internacia kulturo.

XIV. Dekkvara Kongreso en Helsinki.
1922, 9.—15. VIII. Prezidis Sro VON FRENCKELL.
850 anoj el 30 landoj. 14 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kontrakto de la internacia organizo de la Esperanto-Movado. Parolado de Dro PRIVAT pri Esperanta Kulturo.

XV. Dekkvina Kongreso en Nürnberg.
1923, 2.—8. VIII. Prezidis Prof. Dro J. DIETTERLE.
4963 anoj. 12 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Aprobo de la monkolekto por la Zamenhofa monumento. Konfirmo de la Kontrakto de Helsinki; Rekono de UEA kiel oficiala organizaĵo.

XVI. Deksesa Kongreso en Vieno (Wien).
1924. 6.—14. VIII. Prezidis Dro MINIBECK.
3400 anoj. 8 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kongresa Regularo. Lingva Disciplino. Parolado de Dro PRIVAT pri la kultura rolo de Esperantistaro.

XVII. Deksepa Kongreso en Ĝenevo (Genève).
1925, 2.—6. VIII. Prezidis Dro E. PRIVAT.
953 anoj el 35 landoj. 38 oficialaj reprezentantoj.
Prelegoj en la Ia Somera Universitato. Zamenhofa memor-festo. Rezolucioj: Aprobo de la monkolekto por la Zamenhofa monumento, aprobo de la seria libro-eldono de Mosse. Teatra prezentado de "Ginevra". Parolado de Sino MORRIS. Parolado de Dro PRIVAT pri Zamenhofaj idealoj.

XVIII. Dekoka Kongreso en Edinburgo (Edinburgh). 1926, 1.—7. VIII.
IIa Somera Universitato. — Prezidis Sro W. M. PAGE.
960 anoj el 36 landoj. 34 oficialaj reprezentantoj.

XIX. Deknaŭa Kongreso en Danzigo. IIIa Somera Universitato.
1927. 28. VII.—4. VIII. Prezidis Sro B. AELTERMANN.
905 anoj el 34 landoj, 34 oficialaj reprezentantoj. Jubilea Vespero, plantado de la Jubilea kverko en banloko Zoppot, ferma kunsido en Varsovio. Ceremonio ĉe la tombo de Dro ZAMENHOF en Varsovio, Inaŭguro de memortabulo ĉe la naskiĝdomo de la Majstro en Bialystok.

XX. Dudeka kongreso en Antverpeno.
1928. 3.—11. VIII.

Kiel fariĝis nia movado!

Suba tabelo montras en alfabeta vico la historion de la Esperanto-movado en ĉiuj partoj de la mondo. Estas citataj nur faktoj, lokoj, datoj, personoj — evitante ĉian tendencon. Ĝuste pro la pure fakta karaktero tiu tabelo ŝajnas esti "tendenca". Necesas rimarko pri la labormetodo, kiu donis suban tabelon.

Ekster ĉia ŝtata divido, sur la bazo de fizika geografio, ni kolektis la nomojn de landoj, provincoj, regionoj, tute sendepende de la ŝtata aparteneco. Ekzemple ni konsideris la naturan regionon limigitan per Orenoko, Atlanta oceano, Amazono kaj Rio Negro, "Gujanon", kiel unu tuton, malgraŭ tio ke ĝin dispecigis kvin regnoj: Brazilo, Venezuelo, Britujo, Nederlando, Francujo. Sammaniere, la antikva Macedonio fizike restas unupeca tuto, malgraŭ tio ke sur la politikaj kartoj ĝi aperas en tri pecoj diverskoloraj: Bulgara, Greka, Sudslava. Tiamaniere ni povas eviti delikatajn disputojn. Ekzemple, en 1912 estis en Kumanovo, loka pioniro de Esperanto. Politike li apartenis al Turkujo. Nunaj sudslavoj postulus, ke li estu klasita sub reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj. Bulgaroj pretendus, ke li apartenas al la Granda Bulgario, ĉar lia nomo finis je -skij. Nu, dirante, ke li estis en Macedonio, oni konstatas la fakton, kontraŭ kiu neniu povas protesti. Alia ekzemplo. Notante ke en Tifljs (nun — ĉefurbo de Georgio, t. e. ĉefe kartvellingva regiono) aperis armenlingva lernolibro, nia tabelo ne tuŝas la demandon ĉu en Tiflis oni parolas ruse, armene, aŭ en kartvela lingvo. Do, la georgianoj ne emociiĝu, legante en la tabelo, sub la rubriko "Georgio", la vorton "armena". Aliaj faktoj estas, ke la unua rusa lernolibro de Esperanto aperis en Pollando, la unua portugala en Germanio, la unua nederlanda en Svedlando, la kataluna en Madrid, la slovaka en Chicago, la turka en Parizo, la ukraina en Krakovo.

Alia delikata problemo estas la propraj nomoj. Ni ankaŭ ĉie tie sekvis la faktojn. Ni skribis "Loreno" — ne Lotaringio — ĉar ni registris la gazeton "Lorena Stelo", same — "Burgonjo" ĉar ekzistis la "Burgonja Federacio", same: Brandenburgo, Friulo, Nord-Albingo, ktp. Kelkafoje ni estis devigataj distingi tie, kie la neinformita publiko konfuze kunmiksas, ekzemple — ni akceptis ke Holando estas parto de Nederlando, ke Ĉehoslovakio konsistas el Bohemio, Moravio, Silezio, Slovakio kaj Subkarpata Ruslando, ke Japana imperio konsistas el Nipono, Koreo, Formozo, Sahalino, ktp. (kie sub la nomo "Nipono" estas komprenataj nur vere japanaj insuloj: Honŝu, Kjuŝu, Hokaido, Ŝikoku, Cuŝima, Aŭaĵi, Sadoi, k. a.).

Kiel unua provo de tia speco, la tabelo neeviteble havas kelkajn erarojn kaj mankojn, korekteblaj nur per kolektiva kunhelpo. Kelkaj blankaj lokoj, anstataŭ mankantaj informoj, verŝajne restos por ĉiam neplenigitaj, ĉar jam foriris tiuj unuaj pioniroj kiuj povus atesti pri si mem, aŭ pri siaj kolegoj. Se iufoje la loka samideanaro mem ne scias kiu(j) estis la unua(j) pioniro(j), des pli ni, kun fragmenta materialo, malproksime de la loko, ne havas informojn pri la pasintaj jaroj. Kelkafoje okazas kontraŭe: la lokaj esperantistoj de nova generacio nenion scias pri la antaŭa, sed en nia arkivo ni posedas dokumentojn kiuj donas precizajn informojn pri la tiutempa loka movado. Iomgrade ni esploris jarlibrojn, gazetojn, kalendarojn por kompletigi nian tabelon, sed tiu esploro apenaŭ tuŝis la surfacon, la pli granda parto de la laboro restos por estonta generacio. La leganto ne povas imagi kiom da tempo estis foruzita por tiu laboro, kie iufoje unu cifero estas rezultato de kelkhora serĉado, kaj eĉ iu blanka loko reprezentas tempon perditan por vane serĉi mankantajn informojn. La leganto provu mem starigi similan tabelon por sia loko, provinco, kaj li spertos la malfacilaĵojn. Sed, se li trovos ion certan, bazitan sur dokumentoj aŭ kredindaj atestantoj, li ne forgesu fari la kopion por nia UEA-arkivo kaj biblioteko, kie lia ellaboraĵo ne perdiĝos: pliriĉigu la centron, kaj la centro povos poste servi vin.

Lando, Provinco, Ŝtato aŭ etnografia Regiono	G = Unua gazeto; L = Unua lernolibro; P = Unua(j) pioniro(j); S = Unua grupo, loka societo; T = Unua tutlanda federacio; UEA = Delegito de Universala Esp. Asocio.
Abisenio	vidu: Etiopio.
Afriko	vidu: Alĝerio, Angolo, Egipto, Gvineo, Kanarioj, Madagaskaro, Madeiro, Maroko, Maŭrico, Nigerio, Orbordo, Sudano, Sudafriko, Tunizio.
Alasko	P: R. GEOGHEGAN en Fairbanks.
Albanio	P: L. SHÁNTOJA en Skutari 1913.
Alĝerio	P: P. DECOR en Alger 1899, A. CAPÉ-MONTROSIER. G: "La Alĝeria Stelo" 1905. S: 1903.
Alsaco (Elzaso)	P: Sno L. WEBER-JAQUET en Thann 1897, Dro P. KÖNIG, Colmar. G: "Sonorilo Elzasa", Mülhausen 1912. S: Strasbourg 1900, Pr. Ch. Jeanneney.
Ameriko	vidu: Centrameriko, Nordameriko, Sudameriko, Usono.

Anamo *P*: J. FERRÀ 1897.
S: Tourane 1908. I. 19.

Andaluzio *G*: "Gazeto Andaluzia", San Fernando 1910.

Anglolando *L*: R. GEOGHEGAN, Oxford 1889.
P: JOSEPH RHODES, JOHN ELLIS, J. O'CONNOR, W. MANN.
S: Keighley 1902, XI. 7.
G: "The Esperantist", London 1903, Red. H. B. MUDIE.

Angolo *UEA*: Loando 1912.

Apulio *G*: "Corriere Balcanico Esperantista", Bari 1921.

Aragono *S*: Zaragoza 1908. VII.

Arabio (*L*: eld. en Eŭropo 1907.)

Argentino *P*: E. GÖSTA, Buenos Aires 1899.
S: Buenos Aires 1909. IV. 1.
G: "Helpa Lingvo", Cordoba 1911.
T: Buenos Aires 1916.

Armenio *P*: F. AVILOV 1887, A. VEJCLER, I. ARABAĞIANC.
L: H. TER-ASTVACATRJAN, Tiflis 1909.
S: Kars 1908, I. 1.

Asturio *L*: ADAM, Oviedo 1917.

Aŭstralazio vidu: Celebeso, Filipinoj, Javo, Mindanao, Novgvineo, Sumatro.

Aŭstralio *P*: JOHN BOOTH, P. FEEWINGS, P. HOLDSWORTH.
S: Melbourne 1905. II. 10.
G: "The Australian Esperantist", 1908.
T: Melbourne 1919: "Aŭstralazia Esp. Asocio".

Aŭstrio *P*: J. SCHRÖDER, O. SIMON, A. FRIED, S. LEDERER.
L: J. GLÜCK & E. Sós, Wien 1910.
S: Wien 1898.
G: "Klubaj Raportoj", Wien 1907.
T: Wien 1923: "Aŭstria Esp. Delegitaro".

Azerbeĝano *P*: A. WILLIAMS, Baku 1901, P. Kadik.
S: Baku 1909, Elizavetpol.
G: "Bakinskaja Zvezda" 1911.

Baĉko *S*: Sabadka 1912.

Badeno *S*: Freiburg 1891, Karlsruhe 1904. XII.
P: Dro HAAS, L. MAINZER, H. HERBSTER, H. BODE.

Balearoj *S*: Mahon 1907. VII. 18.

Banato *P*: M. PAVLOVITZ, S. SCHULZ.
S: Temeszvár 1911.

Baranio (Baranya) *S*: Pecs 1912.

Baska lando *S*: Bilbao 1906. V. 20; San Sebastian 1906. XI. 1.
G: 1903 "Boletin del 2 Congreso de Esp. Iberios", Bilbao.
T: "Baska Esp. Federacio", 1915.

Baŝkirio *P*: N. FOSS, V. ZAVIALOV.
S: Ufa 1910. IV. 24.

Bavario *P*: L. EINSTEIN, CHR. SCHMIDT, 1888.
L. E. MEIER 1891, E. NEUMARK 1892.
L: L. E. MEIER 1903.
S: Nürnberg 1888, München 1891.
G: "La Esperantisto" 1889 Nürnberg, "Munĥena Esperantisto" 1904.
T: "Bavara Ligo", Prez. Dro ORTHAL, Nürnberg.

Belglando *P*: CH. LEMAIRE, J. JAMIN, A. WITTERYCK, M. SEYNAEVE, R. v. MELCKEBEKE.
S: franca — Bruxelles 1897. XII.
S: flandra — Antwerpen 1903. II; Brugge 1903. XI.
G: "Belga Senorilo" 1902—1908.
T: "Belga Ligo Esp." 1905.

Bengalo *S*: angla — Calcutta 1906. VII. 7.

Besarabio *P*: V. MINKEVIČ 1906, A. GRÜNFELD 1897, F. BOGOSLOVSKI.
G: "Stelo de Besarabio" 1922.

Birmanio *UEA*: Mandalay 1909.

Blankruslando *P*: IVAN LOJKO, G. GRIGORIEV, A. KAPLAN.
S: Vitebsk 1909.

Bohemio *P*: E. KÜHNL, V. KRAUS, T. ČEJKA, J. KRUMPHOLC, BALIK.
S: ĉeĥa — Praha 1902. XII. 9.
S: germana — Reichenberg 1904. VIII.
T: Praha 1907. XI. 12.
L: F. LORENC 1890, Pardubice.
G: "Český Esperantista" 1903.

Boĥario *UEA*: Novaja Buĥara 1913.

Bolivio *P*: V. MUNOZ Y REYES 1902.
S: La Paz 1905. X. 15.

Bosnio *P*: DURO VOJKOVIČ, JAROMIR SCHWARZ, F. ČECH, A. ALEKSIEVIČ.
S: "Stelo Bosnia" 1910.
L: "Ključ Esperanta" 1911.
UEA: Sarajevo 1909.

Brandenburgo *P*: JEAN BOREL, A. SCHMIDT, M. PAGNIER, H. JÜRGENSEN.
S: "Esperanto-Gruppe Berlin" 1903. XI.
T: "Brandenburga Ligo" 1911.
G: "Esperantistische Mitteilungen" 1904.
L: Berlin 1906.

Burgonjo *P*: PRO BORD, TH. ROUSSEAU, P. DEJEAN.
T: "Burgonja Federacio" 1910 Beaune.
G: "Burgonja Stelo" 1909 Châlons.

Ceĵlono *P*: A. WACKRILL, Colombo 1902.
S: Colombo 1908. IX. 19.

Celebeso *UEA*: Totok 1910.

Ĉeĥoslovakio vidu: Bohemio, Moravio, Silezio, Slovakio.
G: "Progreso" 1919.
T: "Ĉeĥoslovaka Asocio Esp." 1920.

Ĉilo *P*: A. BIAUT 1900, L. SEPULVEDRA GUADRA 1903.
S: Santiago 1903. VII. 17.
G: "Ĉilio Esperantista" 1903. "La Du Stelój" 1908.
T: 1907. XII. 8.

Brazilo *P*: A. C. COUTINHO, E. BACKHEUSER, M. ALBUQUERQUE, PRO KEATING, R. GEYER.
L: portugala — Gouvea 1898.
S: Campinas 1906. III. 17; Rio de Janeiro 1906. VI. 29.
G: "Brazila Revuo Esp." 1907.
T: "Brazila Ligo Esp." 1907.

Bretonio *P*: CH. SÉCHEZ en Quimper 1900.

Britujo *T*: "Brita Esp. Asocio" London 1904. X. 14. Prez.: JOHN POLLEN.
S: 1902.
Vidu ankaŭ: Anglolando, Irlando, Kimra Lando, Skotlando.

Brunsvigo *P*: KARP WALLON, CHR. HENNE, Fino K. JAHNS.
L: A. SCHRAMM, Wolfenbüttel 1907.
G: "Universo" 1909.
S: Braunschweig 1904. II.

Bukovino *UEA*: Czernowitz, 1913 — B. LEBEDINSKI, P. SCHACHT.

Bulgario *P*: M. S. BOGDANOV (Diodono), G. OREŠKOV, S. ATANASOV, H. HARALAMBOV.
L: Sofia 1890.
S: Sofia 1889, Tirnovo 1898. XI. 27.
G: "Mondlingvisto" 1889, "Espero" 1890, "Rondiranto" 1902.
T: "Bulgara Esp. Asocio" 1911.

Ĉinlando Norda *P*: S. POLANSKIJ, Tien-Cin 1900; MASEGAWA, Pekin.
L: LU ŜI ĈIN, Shanghai 1912.
G: "Koresponda Kurso" 1913.
S: 1908.
T: Shanghai 1911.

Ĉinlando Suda *P*: R. DARWALL, C. RADEMACHER, H. WINCH — en Honkong 1905; SIFO, Kanton 1910; Won Kenn 1923.
G: "Voĉo de l'Popolo" 1913.
UEA: 1913.

Ĉoseno vidu: Koreo.

Dagestano *P*: Dro A. RIASENCEV. 1905.
S: Derbent 1911.

Dalmatio *P*: R. RUBČIČ, Dubrovnik (Ragusa) 1911.
UEA: Spalato 1911.

Danlando *P*: F. SKEEL-GIÖRLING 1904.
L: C. NIELSEN, Flensborg 1890.
G: "Esperanto-Bladet" 1907.
S: 1897.
T: Köbenhavn 1906. IV. 28 kaj 1908. II. 6 — C. D. E. L.

Danzigo *P*: Sino TUSCHINSKI, L. RAJKOWSKI.
S: 1907. XI. 14.
G: "Informoj de Danziga Esp. Asocio" 1921.

Dobruĝo *S*: Tulĉa 1907. XI. 1.

Domingo *P*: Dro B. MALDONADO, Samaná 1905.
UEA: Sanchez 1911.

Dominikana Respubliko vidu: Domingo.

Don-Kozakio *P*: A. KAPUSTIANSKI, A. VEJCLER.
S: Rostov-na-Donu 1908.
UEA: 1908.

Egipto *P*: A. PIOLET, Ismailia 1901; R. LAUSSAC, Alexandria 1902.
S: 1912.
G: "Egipta Esperantisto" 1922.
T: Kairo 1911.

Emilio (Itala provinco) *P*: A. TELLINI 1909.
L: Bologna 1911.

Estonio *P*: H. ŜTALBERG, W. WAHER, J. RAHAMEGI.
L: H. STALBERG 1899, Tallinas.
S: Reval 1907. VI. 1.
G: "Informoj" 1923.
T: Esp. Asocio de Estonio 1922.

Etiopio
UEA: Karlo Ludvik, Addis Abeba 1925.

Filipinoj
P: Dro Yemans, Fino Zamora, 1901, S. Roxas, Rosano Tesfilo.
S: Manilla 1907. VII. 1.
L: tagaja — 1912.
L: visaja — 1908.
UEA: 1908.

Finlando
P: F. Fagerström 1893, A. Laurén 1899, Fino S. Blomberg 1897, Dro Runeberg, Gustafsson, Antilla.
L: A. Laurén, Jakaja 1906.
S: Helsinki 1894, Tampere 1905. XI. 15.
T: Esp. Asocio de Finlando 1907.
G: "Finna Esperantisto" 1907.
UEA: 1908.

Fiume
S: 1907.
UEA: J. Kastl 1908.

Flandro
L: A. Witteryck, Brugge 1902.
P: M. Seynaeve, R. van Melckebeke.

Florido
P: Mary Esther.

Formozo
G: "Verda Ombro" 1920, Taihoku.
T: "Formosa Esp. Asocio".

Francujo
P: L. de Beaufront, R. Lemaire, H. Huisson, A. Demonget, G. Moch, H. Bel, E. Roux, G. Chavet, E. Lombard.
L: Epernay 1893 (1887 en Varsovio).
S: Reims-Soissons 1894, Louhans 1897.
G: "L'Espérantiste" 1898.
T: "Société Française pour le propagation de l'Espéranto" 1898.
Vidu ankaŭ: Alsaco, Basklando, Belgio, Bretanjo, Burgonjo, Loreno, Monako, Moresneto, Normandio, Pikardio, Provenco, Savojo, Svislando franca.

Friulo
P: A. Tellini, G. Bianchini, G. Meazzini.
G: "Esperanta Abelo" Udine 1907.
UEA: 1912.

Galicio
P: A. Brzostovski, Lwów, Kraków 1898, Orest Kuzma.
L: rutena — M. Jurkiev, Tarnopol 1907.
S: Sanok 1906. Nowy Sacz 1906. Lvov 1906.
G: "Ukraina stelo" Kolomea 1913.

Georgio
P: F. Avilov 1887, N. Rešetin.
L: armena — Ter Asvacatrjan 1909.
L: kartvela — Ivanišvili 1910.
S: Tiflis 1896.
G: "Kaŭkaza Esperantisto" 1910.

Germanio
P: L. Einstein kaj W. Trompeter, Jean Borel, Jules Borel, Ch. Schmidt 1888.
L: (eldonita en Varsovio 1887) Nürnberg 1888.
G: "La Esperantisto" 1889.
T: "Germana Esp. Asocio" 1906.
Vidu ankaŭ: Alsaco, Badeno, Bavario, Brandenburgo, Brunsvigo, Danzigo, Heseno, Luzacio, Moresneto, Nordalbingo, Pomeranio, Prusio, Rejna regiono, Saar, Saksujo, Saks-Turingo, Silezio, Slezvigo, Ŝvabio, Turingo, Vestfalio, Vurtembergo.

Gibraltaro
S: 1907. III. 7.
UEA: Ch. Edwards.

Greklando
P: E. Dragumis, Ateno 1904.
UEA: 1911.
Vidu ankaŭ: Samoso.

Gujano
P: E. Bardoulet, Cayenne 1902, E. Lafontaine, Mana.

Gvatemalo
G: "Centramerika Esperantisto" 1906.

Gvineo
P: Démavest, Blondel 1901.
S: Konakry 1904. I. 20.

Havajo
P: F. Guy Maydurell, Holualoa.
UEA: 1912 Honolulu.

Hercegovino
P: Nikola Bubalo, Mostar.

Heseno
P: Dro Hanauer, Frankfurt a. M. 1905; A. Seidel, C. Küchler, C. Bartel.
UEA: Darmstadt 1911.

Hindujo
P: L. Peltíer 1902 Bombay, A. Chettiar.
UEA: 1908.
G: "Mahaprakaso" 1925, Mylapore.
S: Kathiawad 1906. V. 6.

Hindo-Ĉinio
S: 1902 Saïgon.

Hispanio
L: J. Rodriguez Huertas, Malaga 1890.
S: Malaga 1892.
T: "Hispana Esp. Asocio" 1925.
G: "Esperanto" 1902, Santander.
Vidu ankaŭ: Andaluzio, Aragono, Asturio, Balearoj, Basklando, Gibraltaro, Kastilio, Katalunio, Murcio, Valencio.

Holando vidu: Nederlando.

Hungarlando *P*: J. Miletz, P. Lengyel, L. Makáy, J. Süssmuth, A. Marich.
L: A. Barabás, Koloszvár 1898.
S: Budapest 1902. III.
G: "Lingvo Internacia" Szegzárd 1900.
T: "Hungarlanda Esp. Societo" 1908.

Iberio vidu: Hispanio.

Irako vidu: Mezopotamio.

Irano vidu: Persio.

Irlando *P*: M. Fournier, A. Mac Cormick, J. Douglas.
S: Dublin 1903. IX.
G: "The Irish Esperantist" 1926.
T: "The Irish Esp. Association" 1925.

Islando *P*: Joh. Magnusson 1901.
L: T. Thornsteinsson, Reykjavik 1909.

Istrio *P*: A. Ghez, Ipavitz, G. Muzzati.
S: Gorizia 1911.

Italio *P*: D. Marignoni 1889, C. Bicknell, A. Gallois.
S: 1902.
L: Crema 1890.
T: Riolunato 1901, Napoli 1903, Livorno 1910.
Vidu ankaŭ: Apulio, Emilio, Fiumo, Friulo, Istrio, Kampanio, Latiumo, Ligurio, Lombardio, Piemonto, Sicilio, Umbrio, Veneto.

Japana imperio vidu: Formozo, Koreo, Nipono.

Javo *P*: G. Noordaa, 1902, A. Boers, 1905.
UEA: 1912.
G: "Esperanto" 1923, Banjoewangi.

Jugoslavio vidu: Baĉko, Banato, Baranio, Bosnio, Dalmatio, Hercegovino, Kroatio, Macedonio, Montenegro, Sanĝako, Serbio, Sirmio, Slavonio, Slovenio.

Kalifornio *P*: F. Postnikov, D. Parrish, H. Grimsrud, C. Wimpress, A. Ransford Fetcher, Fino K. Johnson.
S: Los Angeles 1906.
G: "Pacifika Espero" 1913.

Kampanio *P*: Rafaelo Bagnulo, Giovanni Cacciapuoti.
S: Napoli 1903. X.
G: "L'Esperantista" 1902 Napoli.

Kanado *P*: A. Beauchemin, J. Solis, W. Pierce.
S: franca — Montreal 1901.
S: angla — Winnipeg 1905.
L: angla 1903, Montreal.
G: "L'Espérantiste Canadien" 1901.
T: 1907. XI. 1.

Kanarioj *P*: F. Gomes Correa, A. Calrera, Arevalo Valles, Don Ortega.
S: Santa Cruz 1907.
UEA: 1908.

Kaplando *S*: Wellington 1908. X.
P: W. Way, H. Clark.

Kartvelio vidu: Georgio.

Kastilio *P*: R. Andreu, Madrid 1897.
S: Toledo 1904.

Katalunio *P*: V. Inglada-Ors, Pujula y Valles, A. Sabadell, en Barcelona.
L: (en Madrid 1901); F. Pujula y Valles, 1906.
S: Manresa 1905.
G: "Stelo Kataluna" 1908.
T: "Kataluna Esp. Federacio" 1910.

Kaŭkazo *P*: F. Avilov, A. Fišer, D. Naumenko.
T: Tiflis 1906. II. 17.
Vidu ankaŭ: Armenio, Azerbeĝano, Dagestano, Georgio, Kubanjo, Mingrelio, Nordkaŭkazo, Osetio, Terekio.

Kimrlando *P*: G. Meirion Griffith, Ap. Hywel, J. Edwards.
S: 1911.
UEA: 1908 Rhôs.
L: "Agoriad Esperanto" 1910.

Kipro *P*: E. Cirilli, Larnaca 1911.

Kirgizio *P*: Karl Bezin, Orenburg 1899, Ivan Semizorov, Astraĥanj.

Kolombio *S*: San José de Cucula 1909.

Koreo *G*: "Orienta Lumo" Seul 1925.
T: "Korea Esp. Instituto".

Koŝinĉino *P*: Fino Zamora, Saïgon 1901.
S: Saïgon 1905, Prez. Dro Carrère.

Krimeo *P*: Dro Ilja Ostrovski, Jalta 1892; V. Tacievski, Simferopol 1897.
S: Jalta 1904.

Kroatio *P*: M. Ŝpicer, F. Kollar-Krom, P. Kastner, S. Ferri, G. Hradel.
L: D. Bedekoviĉ, Zagreb 1909.
S: Zagreb 1908.
G: "Kroata Esperantisto" 1909.
T: "Sudslava Esp. Ligo" 1923.

Kubanjo *P*: V. Serbin 1889, S. Seferov 1901, M. Parienko.
S: Ekaterinodar 1911.

Kubo *P*: Dro E. F. Rodriguez.
S: Santiago 1907.
T Habana 1910.
G: "Kuba Stelo" 1909.

Kurlando vidu: Latvio.

Kvantungo vidu: Ĉinlando Suda.

Latiumo *P*: L. Giambene, F. Barberi, P. Rodi, S. Alfonsi, G. Laurenti.
S: Roma 1905. IV. 21.
G: "Roma Esperantisto" 1907.

Latvio *P*: Rudolf Libek, M. Klaczko, F. Raekson, V. Ĉeŝiĥin.
L: R. Libeks, Riga 1889.
S: Riga 1905.
G: "Riga Stelo" 1910, Red. V. F. Szmurlo.

Ligurio *P*: C. Bicknell kaj R. Junck 1898, G. Lòria 1904, A. Stromboli.
S: Genova 1910.
L: Genova 1911.

Litovio *P*: V. Devjatnin, B. Kocyn, A. Nedoŝivin, P. Medem, L. Tabenski.
L: A. Dabrauskas, Tilžejo 1890.
G: "Litova Stelo" 1922.
S: Vilna 1892; Tilsit 1908. IX. 15.
T: "Litova Esp. Asocio" 1919 Kaunas.

Livlando vidu: Latvio.

Lombardio *P*: Pro E. d'Aulerio, G. Palvarini, G. Colombo.
S: Milano 1906. XI. 30.

Loreno *P*: M. Bachimont, Metz 1902; Dro Noël, Thiaucourt, F. Lallier.
S: Nancy 1903.
G: "Nancija Esperantistaro" 1905, "Lorena Esp. Ĵurnalo" 1905.

Lotaringio vidu: Loreno.

Luksemburgo *P*: M. Yuckun, Rodange 1902, Fino J. Jacques.

Luzacio *G*: "Luzacia Observanto" Zittau 1924.

Macedonio *P*: M. Arama, Saloniko 1900; T. Sopotskij, Kumanovo; Petrovič, Ohrid.

Madagaskaro *P*: M. Ravelojaona, Tananarive 1901.
S: franca — Tananarive 1906. IX. 10.
S: malgaŝa — Tananarive 1907. XII.

Madeiro *S*: Funchal 1908.

Malako *P*: E. Margery.
S: Singapore 1907. II.

Malgranda Azio *UEA*: Smyrna 1912.

Malto *P*: G. Busuttil, A. Levanzin, N. Tagliafero.
S: Misida 1903. XII. 23.
T: 1906. V.

Manĝurio *P*: Br. Dobrovolski kaj V. Luborski, Ĥarbin 1905; N. Kazi-Girej, Port-Artur 1898.
S: 1908 Ĥarbin.

Maroko *P*: J. Grossart, Tanger; A. Foradada, J. Baigorri, M. Membrillana, Ceuta.
UEA: 1912 Rabat, Tanger.

Maŭrico *S*: Port Louis 1909.

Meksiko *P*: A. Morin, Nogales 1902; Dro Vargas.
L: Ramon Limones 1904.
S: Santa Rosa Necoxtla 1903. XII. 5.
T: Meksiko 1906. I. 20.
G: "Meksika Lumturo" 1904.

Mezopotamio *UEA*: 1912 Bagdad.

Mindanao *S*: Zamboanga 1907. VIII.

Mingrelio *P*: A. Prager 1905, Gagry.
UEA: 1911 Kutais.

Moldavio *P*: G. Panaite, H. Fischer, A. Ornstein.
S: Galac 1904.
G: "Rumana Gazeto Esp." 1908.

Monako *P*: E. Barbier 1900, Dro Richard, G. Moch.
S: 1903. V.

Mongolio *P*: I. Puĉkovskij, N. P. Evstifeev 1899 kaj 1927, S. Stepanov, C. Murphey kaj W. Webb, en Urga.

Montenegro *P*: Pastro Risto Popović-Ĉupić, 1909.

Moravio *P*: Th. Čejka, R. Fridrich, Jan Kajš.
S: ĉeĥa — Brno 1901. VII.
L: Th. Čejka, V. Bilik, J. Holub — 1900.
G: "Revuo Internacia" 1902, Bystrice-Hostýn.

Moresneto *P*: Pro Roy.
S: 1908.

Mozambiko *UEA*: 1913 Imhambane.

Murcio *P*: M. Benavente 1901, A. Villanueva 1908.

Natalo *S*: Durban 1908. II. 24.
G: "The South African Esperantist" 1911.

Nederlanda Hindio vidu: Javo, Celebo, Sumatro.

Nederlando *P*: Fino C. v. Zon 1899, Dreves Uitterdijk, H. Bulthuis, H. Blok.
L: (1886 en Upsala) 1902 Utrecht, D. Uitterdijk.
S: Hilversum 1901.
T: "Nederlanda Societo Esp." 1905 Amsterdam.
G: "Holanda Pioniro" Hilversum 1902.

Nigerio *UEA*: 1911 Lagos.

Nipono *P*: Mackensie, J. v. Doorn, Yokohama 1902; A. Adačie, Tokio; Dro Asada, Dro Kroita, K. Takahaši, Ĉif Tošio.
L: Gauntlett, Tokio 1906.
S: Samtempe 1903 en Tokio, Osaka, Nagasaki, Sanuki, Jidamaši.
T: "Japana Esp. Asocio" 1906, "Japana Esp. Instituto" 1919.
G: "Japana Esperantisto" 1906.

Nord-Albingo *P*: Dro A. Möbusz, H. Böbs, F. Epstein.
S: Lübeck 1911.
G: "Mitteilungen des Nordalbingischen Esp.-Verbandes" 1911.

Nord-Ameriko vidu: Alasko, Kalifornio, Kanado, Usono.

Nord-Kaŭkazo *P*: K. Bogušević, Stavropol 1899.
G: "Kaŭkaza Stelaro" 1907, Vladikaŭkas.
T: 1908.

Normand-insuloj *S*: Jersey 1911.

Normandio *P*: Dro Panel, Th. Liebard, Pro Sauvage, E. Gasse.
S: Rouen 1904. IV. 21.
G: "Revuo Universala" 1904, "Normanda Stelo" 1908.
T: Le Havre 1909.

Norvegio *P*: H Midthus 1899, A. Johnson, J. Allum.
L: B. Rifling, Kristiania 1918.
S: Kristiania 1906.
T: "Norvega Esp. Ligo" 1911.
G: "Norvega Esp. Gazeto" 1909.

Nov-Gvineo *P*: Sro Hyde, F. Simon.
S: Rabaul, 1921.

Nov-Kaledonio *P*: E. Bardoulet, Numea 1899.

Nov-Ruslando *P*: V. Gernet, V. Filipović, Borovko, O. Pergament, A. Kofman, A. Grineva, S. Šatunovski.
S: Odessa 1894.

Nov-Zelando *P*: Roland, St. Clair, T. Stewens, J. Skeates.
S: Auckland 1904. XII. 5.
T: "New Zealand Esp. Society" 1905.

Oceanio vidu: Aŭstralio, Nov-Gvineo, Nov-Zelando, Tahitio.

Oloneco *P*: E. Radvan-Ripinski, Lodejno-Pole 1900, A. Sibiriakov, Petrozavodsk.

Orbordo *UEA*: Kumasi (Coomassi) 1925.

Osetio *P*: Dro A. Naumenko.
S: Vladikaŭkas 1909.

Palestino *P*: Pastro E. Schmitz, Jerusalem 1907.
S: Jerusalem 1908.
G: "Hebrea Esperantisto" Tel Aviv 1924.
L: (en Varsovio 1888 — hebrea, en 1907 araba, kie?)

Persujo *P*: M. Abesgus, Teheran 1901, E. Rebrik, Recht, A. Ter Hovhanisianc, Tabriz.
L: B. Šidani, Teheran 1916.
UEA: 1912 Tabriz.

Peruo *P*: Pro F. Villareal, 1900.
S: Lima 1903. VII.
G: "Antaŭen Esperantistoj" 1903.
L: F. Villareal 1901.

Piemonto *P*: G. Giovanni, M. de Balzac.
G: "L'Esperantista" 1902 Torino.

Pikardio *P*: E. Payen, Ch. Tassencourt, A. Charlet, G. Queste.
S: 1902. II.
G: "Pikarda Stelo" Amiens 1913.

Podolio *P*: E. Manjkovskaja 1889, I. Ĉetverikov 1901 kaj S. Šatunovski 1905, en Kamenec.

Polesio *P*: V. LASKIN, Smolensk kaj M. GOLDBERG, Minsk, en 1899.
S: Smolensk 1896.

Polinezio vidu: Tahitio.

Polujo *P*: A. GRABOWSKI, K. BEIN, L. BLUMENTHAL, J. WASNIEWSKI, V. BRZOZOWSKI.
L: pola — 1887, judgermana — 1888, rusa — 1887, germana — 1887, hebrea — 1888, ukraina — 1911.
S: Warszawa 1893.
G: "Junulo" 1905 Varsovio.
T: "Pola Esp. Asocio" 1907.

Pomeranio *P*: H. LUCAS, E. BEUGE.

Portoriko *UEA*: 1909 Ponce.

Portugalo *P*: JAYME, HEINLEIN FERREIRA 1892, COSTA E ALMEIDA, Rezende 1898.
L: (1892 en Nürnberg). J. PROENCA 1907.
S: Porto 1909.
G: "Portugala Revuo" 1909.
T: "Portugala Esp. Asocio" 1925.

Provenco *P*: H. HUET, P. TOURRETTE, F. CASTELJAU.
S: Nice 1901. XII.
G: "Provenca Stelo" Valence 1913.

Prusio *P*: A. EBNER, Königsberg 1897.

Rejnlando *P*: W. H. TROMPETER, Schalke 1891.
S: Schalke 1890, Düsseldorf 1907. I. 29.
G: "La Esperantisto" 1892 Schalke. "Mitteilungen des Rheinisch-Westf. Esp.-Verbandes" Essen 1912.

Rodanio *P*: Dro H. DOR, A. OFFRET, CH. BÉGEL, Fino ZABILON D'HER, L. PONCET, Sino FARGES, en Lyon.
S: Lyon 1902. III.
T: Se-Etienne 1909.
G: "Rodana Stelo" Valence 1914.

Rodezio *P*:

Rumanio *P*: M. FROLLO, G. ROBIN, H. FISCHER.
T: "Rumano Esp. Societo" 1907.
Vidu ankaŭ: Banato, Besarabio, Bukovino, Dobruĝo, Moldavio, Transilvanio, Valakio.

Ruslando *P*: A. GRABOWSKI, V. MAJNOV, V. KRAVCOV, E. WAHL, A. ZINOVIEV, I. LOJKO, I. SELEZNEV, V. DMITRIEV, A. FIODOROF.
L: (1887 en Varsovio).

S: "Moskva rondeto" 1889, "Espero" Peterburg 1891.
G: "Ruslanda Esperantisto" 1905.
T: "Espero" 1892.

Saar *P*: A. OMLOR.
G: "Saar-Radio-Zeitung" 1926.
T: "Esp. Ligo Saarteritoria" 1923.

Saksio *P*: L. ELB, MARIE HANKEL, A. SCHRAMM, W. VELTEN, K. VON FRENCKELL, H. ARNHOLD, F. STEPHAN, BLACHSTEIN.
L: Leipzig 1906.
S: Leipzig 1906. I. Dresden 1906. XI. 1.
G: "Saksa Esperantisto" 1907.

Saks-Turingo *P*: Dro C. ROHRBACH, E. STARK.
T: "Saks-Turinga Esp. Ligo" Magdeburg.

Samoso *P*: A. STAMATIADIS 1904.
S: Vathy 1906.
L: Samos 1907.
G: "Greklingva Esperantano" 1909.

Sanĝako *P*: P. STOJAN, Novi Pazar 1922.

Savojo *P*: Pro CHABRAUD, Pro BOUCON.
S: Samoëns 1901, Annecy 1902.

Senegalo *P*: L. PONTOISEAU, Dakar 1904.

Serbio *P*: M. AVRAMOVIĈ 1904, S. BUDJEVEC 1909, D. ANDONOVIĈ 1910 — en Beograd, S. AĜIĈ, R. KLAJIĈ.
L: J. JOVANOVIĈ, Kragnjevac 1908.
S: "Serba Esp. Societo" Beograd 1909.
G: "Serba Esperantisto" 1910.

Siberio *P*: J. PUČKOVSKI 1892, A. MARTAKOV, N. EVSTIFEEV, P. KADIK, V. SZMURLO, S. POLANSKIJ, S. OBRUČEV, R. FRENKEL, I. SERIŠEV.
S: Krasnojarsk 1896, Tomsk 1908. III. 31.

Sicilio *P*: V. NALLI 1901, FRANZ 1904.
S: Palermo 1903. XI.
G: "Idealo" 1906.

Silezio *P*: C. WALTHER 1897, en Hirschberg.
S: Glatz 1903. XII.

Sirio *P*: GABRIEL HADDAD 1909.
L: (? presita en Italio?)
UEA: 1913.

Sirmio *P*: L. GALLIAU, J. SCHNEIDER, Zemun (Semlin).
G: "Zemuna Esperantisto" 1912.

Skotlando *P*: J. HAIG, BUCHANAN, CHRISTEN, J. WARDEN.
S: Glasgow 1903. IV. 30.
G: "Norda Stelo" Aberdeen 1905.

Slavonio vidu: Sirmio.

Slezvigo *P*: Dro A. MYBS, Altona 1903; W. CURT, S. SCHÖN, F. ZUCCHAROLLI, A. HOFFMEISTER.

Slovakio *P*: A. ŠKARVAN.
L: (1909 en Chicago).

Slovenio *P*: L. KOSER, D. HERKOV.
L: (1910 en Zagreb).

Sovet-Unio *T*: "Sovetlanda Esp. Unuiĝo" 1921 Moskva.
G: "Internacia Lingvo" 1924.
Vidu ankaŭ: Armenio, Azerbeĝano, Baŝkirio, Blankrusio, Boĥario, Dagestano, Don-Kozakio, Georgio, Kaŭkazo, Kirgizio, Krimeo, Kubanjo, Mingrelio, Mongolio, Nord-Kaŭkazo, Nov-Rusio, Oloneco, Osetio, Podolio, Polesio, Ruslando, Siberio, Tatario, Taŭrido, Tereko, Turkestano, Turkmenio, Ukraino, Uralio, Usurio, Volinio.

Stirio *P*: R. SPERL, Leoben 1897, J. SCHMEIDEL.
S: Graz 1906. X. 16.
T: Graz 1911.
G: "Mitteilungen des Steirischen Esp. Vereins" 1917.

Sud-Afriko vidu: Kaplando, Natalo, Rodezio, Transvalo.

Sud-Ameriko vidu: Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilo, Gujano, Kolombio, Peruo, Trinidado, Urugvajo, Venezuelo.

Sudano Egipta *UEA*: 1910 Khartum.

Sudano Franca *P*: CH. DE TROISMONTS, Segu 1897.
UEA: Bamako.

Sumatro *P*: TH. RASOUT KÜHR, Bajoeng Lentjer 1906.

Svedujo *P*: G. HENRICLUNDQUIST & PAUL NYLÉN 1889, Cederblad, CL. ADELSKÖLD 1890, S. LUNDSTRÖM, G. BACKMAN 1891, B. JONSSON 1892, O. ZEIDLITZ 1894, V. LANGLET 1894.
L: (1889 en Varsovio). 1890 en Flensborg, CHR. NIELSEN.
S: Upsala 1891, Stockholm 1898. IV. 4.
T: Stockholm 1906. XII. 1.
G: "Lingvo Internacia" Upsala 1895.

Svislando *P*: E. NAVILLE, Genève 1898.
G: "Svisa Espero" 1903.
T: "Svisa Esp. Societo" 1902. IX. 27.

Svislando romanda (franclingva) *P*: ERNEST NAVILLE 1898, TH. RENARD & JEAN BOREL 1901, HECTOR HODLER, EDMOND PRIVAT, EMILE BERNARD & EDOUARD MALLET 1903, RENÉ DE SAUSSURE 1906 — ĉiuj en Genève, Fino ALICE RICHARDET en Morges 1898, MARCEL MERKENS 1903 Leysin, R. HORNER 1907, HERMANN STROELE, Neuchâtel 1911.
S: "Unuiĝo de Junaj Esperantistoj" 1903. III. Genève.
G: "Svisa Espero" 1903, "Juna Esperantisto" 1903 — Genève.

Svislando alemana (germanlingva) *P*: HOPF, ADELBODEN, F. SCHNEEBERGER 1903, A. NÖTZLI, H. FRIDÖRI, J. SCHMID, ED. STETTLER, J. PERLET, CH. PULVERS, F. UHLMANN, E. WERNER.
L: A. NÖTZLI 1906.
S: St. Gallen 1904. VII.
G: "Flugila Stelo" 1906.

Svislando itala *P*: CH. WEILBACHER, Isella, Lugano 1915.

Tahitio *P*: M. GUITTENY, Borabora 1904.

Taivano vidu: Formozo.

